

1000–1599 paŝoj – 18 baladoj

& Renkonto en musono:	450
& Iva balado:	453
& Jupulino:	457
& Alo Dino kaj la edzina ruzo:.....	460
& Je la naskiĝtago de Zamenhof post la mondmilito:....	463
& Per espero al despero:	466
& Literatura reviviĝo:	469
& Ebe Skamelido:.....	473
& Knabinoj de Muhu:.....	477
& Husaro:.....	480
& Diru ĉiam la veron!:.....	483
& Al la Esperantisto:	486
& Se la sorto persekutas:	489
& La Vojo kaj Preĝo verdaj:	492
& Viljama balado:	495
& Pigra Petro:	499
& La cerbo:	502
& Jun kaj Lager:	506

& Renkonto en musono:

< Rekante 31 el 61 batoj por strofo, entute 1037 paŝoj dum 11 minutoj. Verkis Evert Taube. El sveda tradukis Martin Strid (2010) kaj aldonis rekantaĵon (2015). Norda Kantaro #4470. Klarigoj (*): '2 La flago de Svedujo estas blua kun flava kruco. '3 "Ŝi" en marista ĵargono estas la ŝipo. '4 Stiristoj de ŝipo rangas en vicordo. '5 "La varmo", tropikaj landoj en mar'komerca ĵargono. '9 Pasporta foto. '10 Al ferdeko, laboro nek stira nek maŝineja. ; Siamo, malnova nomo de Tajlando. ; Hagenbeck, fama bestoĝardeno en Hamburgo, Germanujo. '11 Cejlon(o), malnova nomo de Srilanko. '14 Kamarin' estas urbo sur insulo Malabar'.>

(#Melodio:

<1,6:61>

(So /do dore mi mifa soso sola so; mimi fafa fafa mimi mido re e ; soso mimi soso mimi mimi fafa lala fa; fafa mimi mido rere reTi do o;

(#Rekantaĵo: so3so sola somi redo fa3fa faso la; lala ti3ti tila soso fami faso la so; so3so sofa mimi redo re3re rere so; sofa mi3mi redo rere fami redo re do o)

)×17)+

(&Strofoj:

'1 Ni /ŝipon renkontis en friska la muson' ; dum vaporveturis ni al Ruĝa Mar', ; plenrigitan trimastulon je la nomo de Tifon' ; de Hinduj' velanta al Bonesperkab'.

'2 Ni hisu nian flagon, la ŝipestro ordonint', ; kaj ni hisis la flavbluan* por salut' ; kaj eĉ sammomente blovis de la ŝipa gafa pint' ; la Finnlanda blanka kun la blua kruc'.

(×: 2× **Brile blankaj veloj sur la blua ocean' ; bele grandaj en musona varma vento flirtas.**)

'3 Ni igis nin proksimen kaj maŝinon al senmov' ; por haltigi, hejmen porti da mesaĝ' ; kaj ŝi* lofis tiam envenanta kun la venta blov' ; de babord', kaj ni transremis kun kuraĝ'.
.....

'4 Nin venis malantaŭe kaj ŝipmeze ŝnur'eskal' ; kaj stiristo kvara* grimpis per aplik' ; sed en pobo staras sveda, revidanta min, ŝipan' ; Fritjof Anderson, la infanaĝamik'.

'5 En musono kaj pasato renkontiĝas oni foj;e se velas al la varmo* kiel ni, ; tamen surpriziĝis mi kvankam grandis pli la ĝoj' ; revidanta la amikon tie ĉi.

'6 Oni rabis min Ĉinuje, mi rabiĝis en Ŝanhaj' ; kaj mi sidis ĉe piratoj als ostaĝ' ; sed edziĝis mi al la filino de l' murdist' Fu Ŭaj ; diris Fritjof, jen terura veropaĝ'.

'7 Kun la helpo de l' ĉinino venis mi al Singapur' ; placon staras mi sen mono kaj pasport' ; kiam vir' en or'galonoj al mi iras, la konsul' ; sveda, kapitano Fredrik Adelborg'

'8 Nu saluton, Fritjof Anderson, diras Adelborg', ; kion, die, faras vi en Singapur'? ; De Rivero Flava venis, volas mi al Goteborg', ; min prefere dungu ŝip' al hejmvetur'.

'9 Mi ricevis blankajn vestojn kaj pasporton kun portret'* ; reĝtitolan kaj mi pruntis pundojn dek. ; Konsulino min invitis al teum' kaj babilat', – mi ĝis tiam ne pli belan vidis, nek.

'10 Nu, mi prenis vaporŝipon kaj dungiĝis al ferdek'*, ; ni sovaĝajn bestojn ŝargis en Siam'*, ; tigrojn, elefantojn, leonojn aĉetis Hagenbek'* ; ja Hamburge vi vizitis, ĉu, iam'?
.....

'11 Sed el ĉiuj tiu estis plej terura la vojaĝ', ; sudob Cejlon* ni eniris en ciklon', ; elefanton saltis leono kurinta de la kaĝ', ; ŝtormo muĝon miksis kun la tondra son'.

'12 Baldaŭ lukoj rompiĝis kaj elvenis la bestar', ; en la maron falis nia komandej'. ; Mastojn elefanto rompis kaj bovon en la mar;on ĵetis, knabo, kreu min je vorto plej!

'13 L' agenton de Hagenbek'
formanĝis la leon', ; en
maŝinon nian grimpis nun
goril'. ; Maŝiniston ŝi imitis
per antaŭen, halt', retro' ; ĝis
mi pafis ŝin per ŝipestra pafil'.

.....

'14 Estis Nemezo mem de l'
ĝangaloj, kamarad', ; baldaŭ
restis nur mi kaj la elefant'. ;
Sudmuson' al ni revenis post
ciklona la pasad', ; Kamarinon
Malabare* endrivant'.

'15 Sed adiaŭ, ĉar stiristo via
iras de ŝiprand'. ; Jes, sed
Fritjof, kien pasis l' elefant'? ;
Je revido venontfoja mi
respondos al demand', ; nun
ekvelos ni, denove direktant'!

.....

'16 Kaj al pleno ili brasis, jam
la iron komencant', ; kaj
reremis ni al nia ŝipo ĉar ; ŝi
musone iris kaj aŭdeblis jam
ilia kant': ; Rul' al hejm', rul' al
hejmo trans la mar'!

'17 Mi kalkulis ĉiujn velojn
kaj kalkulis ilin re ; de
reĝveloj ĝis postmastaj kaj
forĵib' ; Estis sume dudek du
blankaj veloj en l' aer' ; sur la
blua oceana trembril'.

& Iva balado:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 1073 paŝoj dum 12 minutoj. Verkis kaj komponis Martin Strid modifub polsa melodio el Orsa, Svedujo. Klarigojn (*) vidu post la strofoj.>

(# Melodio:

(/LaLa dodo milfa mire; re doTi domi; soso soso faso laso; soso mire doTi;

(#Rekantaĵe: Lado mifa mire redo doTi domi laso mimi LaTi dodo mimi doLa TiSi La a)

)×37)+

(& Strofoj:

'1 /Kantos mi bala2don de ;
Ivo Lapenna* ; trian gvidis
lukton li por ; lingvo
mondkomprena.

(×:; **En la lumon levis li
Universalan Esperanto-
Asocion* kaj la lingvon de l'
homar'**.)

'2 Ĉe Unuiĝintaj Nacioj ; estro
mondestabla ; Sciu ke la vorto
iva ; signifas igkapabla.

'3 Ĉe unua provo ankoraŭ ; nia
majstro vivis ; sed pri bo[no
de Blujido Bofronta* ; tro li
naivis.

'4 Prezentiĝus Esperanto ; en
Parizo pompa ; sed fiaskis*
pro la vanto ; de idistoj
trompaj.

'5 Post milito monda oni ;
duafoje provis ; Ligo de
Nacioj* volis ; pacan moron
trovi.

'6 Francoj diris ke ilian ;
lingvon elitan ; devas uzi tuta
mondo ; civilizita.

'7 Poste nazioj venis ; ankaŭ
faŝistoj ; estis espoj sur iliaj ;
malliberiglistoj.

'8 Hitler* Esperanton fermis ;
per perforto nuda ; nepre volis
li ekstermi ; la lingvon de la
judo.

'9 Espoj sovetuniaj devis ; por
vivo batali ; en la
laborkoncentrejoj ; de
kamarado* Stalin*.

'10 Pri bezono komunika ;
imperioj surdas. ; La movadon
en Rusujo ; Stalino murdas.

.....

'11 Post la dua mondmilito ;
estis rekomenco ; Unuiĝintaj
Nacioj havis ; bonan
pacintencon.

'12 Ĉu kolonia devos esti ; ĝia
laborlingvo ; kvankam povas
ni atesti ; multe pli bonan
atingon?

'13 Tian lingvon oni ĉagrenos
; pro temporabaj studoj. ; Por
la homoj ne konvenos ;
idiomaj trudoj.

'14 Lingvo nacia malfacilas ;
per esceptoj en vico. ; Por
lernantoj ne utilas ; gramatika
kaprico.

'15 Angla lingvo progreson
drenas ; elparolon konfuzas. ;
Pene oni per ĝi komprenas ;
kiujn vortojn uzas.

'16 Inter la nacioj serĉas ; Ivo
apogon, ; devas Esperanton
defendi ; kontraŭ mensogoj.
.....

'17 En Urugvajo Unesko ;
Esperanton traktos ; ĉar ĉe
membroj scioj kreskas ; pro
Ivo pri la faktoj.

'18 Peticion subskribis
naŭcent ; mil individuoj ; kaj

organizoj aplaŭde ; kvincent
kontribuoj

'19 Delegacio de Meksiko ; ĉe
la konferenco ; donis por la
lingvo indikon ; de bona
intenco.

'20 De lingvistika fako ; oni
konsilon petas, ; sed jen
Blinkenberga atako ; kvazaŭ
analfabetas.

'21 Lerte li la petskribon
tondis ; per mensogoj tute ;
kaj rajtis Ivo respondi ; nur
triminute.

'22 Voĉdono unua estis ; nia
malvenko ; sed malcede Ivo
restis ; bola sur la benko

'23 "Ĉu ciferojn romiajn do ;
por eĉ pli granda klaro? ; Mo
co mo lo i kaj vo ; signifas
nunan jaron.

'24 La programkomisiono
rifuzis ; pro moko de la dano. ;
Ĉu mi povas tion eluzi ; ĉe
montevideanoj?

'25 Blinkenberg nian lingvon
komparis ; kun urugvaja
menuo. ; Pri ties moko mi
faros ; per gazetoj bruon!" ...

'26 Fine tial Unesko akceptis ;
lian proponon ; kaj konsentis
ĉiam respekti ;
esperantorezonon.

'27 Dek du jarojn poste Ivo ;
frontis pli grandan defion: ; Al

Unuiĝintaj Nacioj ; faris ni
peticion.

'28 Sepdek milionoj da homoj
; Esperanton apogis. ; Imperiaj
idiomoj ; ne ilin allogis.

'29 Sed ankaŭ tiam gajnis ;
koloniaj potencoj. ; Nova
lingvo al ili ŝajnis ; mise
konsekvenci.

'30 En universitato Kembriĝa ;
du studentoj ronkis ; apud
Johano Putoj prestiĝa ; estis
Hamfri Tonkin.

'31 Ili regon anglan amis ; kaj
fanfarone ; volis per ĝi vaste
fami ; potenculojn kone.

'32 Dermod* per satiro mokis:
; "Ivo diktatoras" ; kio Ivon tre
provokis ; "Kiu vin
sponsoras?"

'33 Puĉis ne la komunistoj ; en
UKo Hamburga* ;
angloamerikaj statistikoj ; lerte
dramaturgas.

'34 Post la fia kalumnio ; estas
mia sento: ; Al la monda
asocio ; mankas jam la dentoj.
.....

'35 Sed ne kredu vi ke estas ;
konspiracio, ; se oni al vi
ridetas, ; fidu al tio.

'36 Kaj naive kredu, kara, ; ke
ĉiuj homoj bonas, ; kaj batalon
cedu ĉar ; perfidon vi ne
konas.

'37 Kaj la vivo estu glata ; kaj
la tero plata ; kaj ne ronda ĉar
la mondon ; vidas vi trompata.
.....)

< **Klarigoj al Iva balado:**

'1 Ivo Lapenna (1909-1987),
kroatespo, estrarano de
Internacia Esperanto-Ligo ek
de 1938 kaj de Universala
Esperanto-Asocio ek de ĝia
fondo en 1947, ĝia ĝenerala
sekretario ek de 1955 kaj
prezidanto 1964-1974.

'2 Universala Esperanto-
Asocio, monda organizo por
esperanto refondita en jaro ...
...

'3,4 Louis de Beaufront
(elparole Luide Bofro') estis
komisiab Zamenhof
prezentonta al franca registaro
en jaro 1907 lingvon
esperanto, sed anstataŭe
prezentis propran
reformprojekton "Ido".

'8 Adolf Hitler, ideologo de
naziismo, diktatoro de
Germanujo 1933-1945.

'9 Kamarado, komunisma
ĉiestitolo ; Josef Stalin,
diktatoro de Sovetunio 1924-
1954(?).

'20 Andreas Blinkenberg
(1893-1982), dano, profesoro
pri romanistiko.

'23 Romie, MCMLIV estas
1954, kio estas la jaro de

Unesko-rezolucio de
Montevideo pri esperanto.

'32 Dermot Quirk, membro de
Brita Esperanto-Asocio.

'33 En Universala Kongreso
de Esperanto en Hamburgo en
jaro 1974, Ivo Lapenna
elposteniĝis per malamika
intrigo.

>

& Jupulino:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 1073 paŝoj. Verkis Vladimír Gazda (Frenezetaĵoj, Bratislava 1992). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio de Drako Longa kaj rekantaĵo de Davida balado.>

(#Melodio:

<1,6:29> (

/mimi mire redo dodo; dodo dore mimi; mimi mire mire mimi;
soso fami mimi;

(#Rekantaĵe: redo re rere mire do rere re; rere mire doTi LaSo So
LaTi do o)

)×37)+

(Strofoj:

'1 En montaro en dometo ; ĉe
la vilaĝfino ; vivis, jen, geedza
paro ; juna kun filino,

(×: **Bruas danco en halo,
dancu en ĉen'!** ; **Ĝojaj paŝas
ni en esperanto-kunven'**.)

'2 knabineto belstatura, ;
ĉarma en vizaĝo, ; knabineto
milsemajna – ; do en tiu aĝo,
.....

'3 kiam oni ne plu emas ; vivi
en soleco, ; sed interesiĝas pri
la ; dua homa speco.

'4 Ruĝan jupon ĉiam porti ;
ŝatis la knabino. ; Tial ŝin la
vilaĝanoj ; nomis Jupulino.
.....

'5 Iun tagon – estis ĝi jam ; ĉe
la semajn-fino – ; ŝi preparis
sin zorgeme ; iri al avino,

'6 kiu en domet' soleca ; vivis
en arbaro, ; iam-tiam vizitata ;
de la parenaro.

'7 Nun sepdekan naskiĝtagon ;
festos la avino, ; kaj do korbon
da bakaĵoj ; kun botel' da vino
.....

'8 la patrin' al la knabino ; en
la manon donis ; kaj por ke ŝi
plensukcesu, ; jene ŝin
admonis:

'9 "Paŝvojetajn evitadu, ; al la
voj' vin tenu, ; por ke vi
sekure al la ; avineto venu!

'10 Tuj transdonu la korbeton ;
kaj gratulu bele ; kaj revenu
tuj, dum estas ; en arbaro
hele."

'11 Jupulin' la korbon prenis ;
kaj adiaŭ diris ; kaj la vojon al
l' avino ; brave si ekiris.

'12 Ŝi rapidis, ke svingiĝis ;
ŝia ruĝa jupo. ; Kaj subite
ekaperis ; antaŭ ŝi – jen –
lupo!

'13 – aĉa, hirta, malgrasega, ;
kun dentare'danĝera, ;
timegiga, granda, monstra – ;
vera best' infera.

'14 Ĵetis Jupulin' la korbon ;
kaj forkuri volis, ; sed la lupo
ŝin hom-voĉe ; jene alparolis:
.....

'15 "Trankviliĝu, Jupulino, ;
timi vi ne devas –" ; diris li kaj
la falintan; korbon al ŝi levas.
.....

'16 Jupulino fulmrapide ;
venkis sian miron. ; "Kian vi,
do, lupo, havas ; kontraŭ mi
deziron?

'17 Ĉu vi volas vinon trinki, ;
manĝi bakajeton – ?" ; "Ne,
mi havas pri alio ; al vi unu
peton.

'18 Mi ne estsas tiu lupo ; el
infan-rakonto, ; kiun vi ja
bone konas; por mi estus
honto

'19 senkompate nun formanĝi
; knabinetontian." ; – kaj
ridete li ekmontras ;
dentegaron sian.

'20 "Mi ne estas best', sed
homo, ; ensorĉita princo, ;
kondamnita esti lupo ; kun
aĉega grinco."

'21 "Kaj ĉu tia resti devos ; vi
ĝis via morto?" ; "Ne. Ŝanĝiĝi
tute povus ; mia aĉa sorto

'22 se knabino iu mian ;
plagon ekkomprenus ; kaj min
– aĉan beston- kisi ; ŝi ne
abomenus.

'23 Ŝia kiso rompus tuj la ;
forton fi-magian ; kaj rehavus
mi denove ; homan bildon
mian."

'24 Ekkompatis Jupulino ;
lupon la mizeran ; kaj eksentis
bedaŭregon ; por li fortan,
veran;

'25 la okulojn fermis ŝi ; por
venki la malplaĉon ; kaj
kiseton treme donis ; al li sur
buŝaĉon.

'26 Kiam ŝi l' okulojn poste ;
remalfermis plene, ; pro
surprizo ŝi grandega ; preskaŭ
falas svene:

'27 ne plu staris tie lupo ; kun
sovaĝa grinco – ; antaŭ ŝi nun
fakte staris ; bela, juna princo,
.....

'28 ŝin rigardis dankoplene – ;
ŝi nur plue miris – ; kaj per
voĉo dolĉasona ; jenon al ŝi
diris:

'29 "Dankon, kara belulino, ;
por la ag' bonfara. ; Sed ĉar mi
ne volas resti ; rekompenc-
avara

'30 kaj prezenti kiel dankon ;
al vi nuran dirojn, ; mi nun
volas tuj plenumi ; al vi tri
dezirojn:

'31 Kion ajn deziras vi, ĝi ;
venos en momento, ; la
dezirojn mi plenumos ; via je
kontento."

'32 Alrigardis Jupulino ;
princon nian danke ; kaj
komencis lin esplori, ; taksi
ĉiuflanke:

'33 altstatura estis la kaj ; forta
kaj larĝbrusta, ; ĉio ŝajnis ĉe li
esti ; plej perfekta, ĝusta.

'34 "Ne hezitu, belulino, ; vere
mi disponas ; pri la povo, kiu
ĉion ; al petanto donas.

'35 Diru, kion vi deziras?" ; li
ŝin kuraĝigis. ; Sed rigardon
sian plue ; ŝi nur al li ligis.

'36 Tiam io trapenetris ; tute
ŝin, ĝisoste, ; ŝi la princon
alridetis, ; eksuspiris, poste
.....

'37 la rigardon teren klinis ;
kaj ekflustris ĝoje: ; "Mi
deziron havas solan, ; sed tiun
– tro foje!"

& Alo Dino kaj la edzina ruzo:

< Rekante 15 el 29 aŭ 20 el 34 batoj por strofo, entute 928 aŭ 1088 paŝoj dum 10 aŭ 12 minutoj. Armenan fabelon poemigis Julio Baghy (Ĉielarko, Tenerife 1966). Baladigis Martin Strid (2016) per feroaj melodio kaj rekantaĵo de Petro sinjor' kaj Elinborg aŭ per tiuj de Vilmunda balado.>

(#Melodioj:

(# Harra Pætur og Elingborg: <1,6:29> /LaaLaLa LaMi SiSi La; LaLaTi doTi LaSo; TiTi TiTi TiTi dodo; doTi doTi LaSo;

(Rekantaĵo: Ti TiTi La SolFa Mi LaTi do do;Ti Ti TiTi Mi LaTi doTi La a))

? (# Vilmunds kvæði: <1,6:34> /fami sofa fami mire; rere dore mimi; miimimi fami fami faso; sofa fafamii redo;

(#Rekantaĵe: mimi fa mi re; rere dore mi; mimi mimi mi fa;so sofa fami fami reldo; mimi fa mi re e))

)×32)+

(&Strofoj:

'1 "/Kara edzo, Alo Dino, ; kion vi preĝpetas?" ; "Ĉiutage, ho, edzino, ; mi de Dio petas,

(×: &Rekantaĵo:

(& Harra Pætur og Elingborg: **Nun emas mi e2n dancon jam iri ; dum rozoj, lilioj kreskadas tre.)**

? (& Vilmunds kvæði: **Dancu mastrino ; belan elektas mi. ; Dancu min al mano ; ja bele kiel povas vi2. ; Dancu mastrino.))**

ke Li donu pluvon, sunon, ; al la agrosulko, ; for de hejmo tenu punon; estu lardo, bulko!"

(×: &Rekantaĵo)

'2 "Estus saĝe, Alo Dino, ; en la preĝon plekti: ; kontraŭ ruzo de l' edzino ; volu min protekti!" Li priridis moke brue ; vortojn de l' edzino: ; "Peti tion superflue!" ; diris Alo Dino.

'3 Ŝin ofendis tiu rido,; eĉ
diable tiklis ; kaj ŝercema
venĝospito ; en ŝi tuj ekviglis.
..... Do ŝi pensis: "Alo Dino, ;
montros mi instrue, ; ĉu pri
ruzo de l' edzino ; preĝi
superflue?"

'4 Dum sur kampo Alo Dino ;
pluglabore ŝvitis, ; ĉe vendisto
la edzino ; belajn fiŝon vidis
..... kaj el ili ŝi aĉetis ; je la
propra plaĉo, ; sed *vivantaj*
ilin metis ; al – tagmanĝa
kaĉo.

'5 Lin sub arbon kun afablo ;
vokis ŝi invite: ; "Alo Dino, ĉe
tuk-tablo ; manĝu apetite!"

Dum en ombro li tagmanĝis ;
grasan kaĉon, bulkon, ; fiŝojn
ruze ŝi aranĝis ; en plugotan
sulkon.

'6 Post foriro de l' edzino ; kaj
post buŝoviŝoj ; ree plugis Alo
Dino ; ĝis trovo de l' fiŝoj...
..... Hej, sed kiam el sub tero ;
vivaj fiŝoj venis, ; mirfrapite
pro l' apero ; tuj li duonsvenis.
.....

'7 "Dio sankta! Jen miraklo! ;
Brile ĝi atestas, ; ke pro Dio
eĉ en agro ; vivaj fiŝoj
kreskas". Hejmen portis la
"miraklon" ; nia Alo Dino, ;
rakontinte la spektaklon; diris
al l' edzino:

'8 "Se jam Dio fiŝojn donis, ;
ilin mi profitu". ; Lip-lekante
li ordonis: ; "La "miraklon"
fritu!

Ĉar mi volas eĉ
festeni, ; estu fajna vino!" ;
Kapjesante lin kompreni ;
montris la edzino.

'9 Por tagmanĝo la edzino ;
friton do plenumis,; sed ne
manĝis Alo Dino: ; ĉion ŝi
konsumis... .. Tre malsata
Alo Dino ; vane nur atendis ;
je frititaj fiŝoj, vino... ;
Grumble li lamentis:

'10 "Nu, la fiŝoj, kie restis?" ;
urĝis Alo Dino. ; "Fiŝoj? Kiaj?
Eĉ ne estis!" ; miris la edzino.
..... "Pro Diablo! Fiŝoj miaj, ;
el sub ter' plugitaj". ; "Edzo
kara, vortoj viaj ; ŝajnas stulte
spritaj".

'11 "Stulte spritaj?" kriis Dino
; kaj bastonon prenis, ; sed je
kriĉoj de l' edzino ; la najbaroj
venis... .. "Helpu! Min li
volas bati! ; Agas li saĝperde!
; Volu helpi, min kompati! ;
Li frenezas certe".

'12 La najbaroj Alo Dinon ;
lukte boksis, bridis, ; kiam
bati la edzinon ; preta lin
ekvidis. "Do, virino, al ni
diru, ; kial li koleras?" ; "Lin
demandu! Li mem diru, ; kial
li kverelas?"

'13 "Mi ja diros, virinaĉo", ;
por si pledis Dino. ; "Mankis
ĉe tagmanĝa kaĉo ; fiŝoj miaj,
vino!" "Kiaj fiŝoj ili
estis?" ; la demando flugis. ;
"Kiaj en la agro kreskis, ;
kiujn mi elplugis".

'14 Post respondo tuj konsente
; jesis ĉies kapo: ; "Nun ĉe
Dino evidente ; rustas
cerboklapo". Liajn manojn
kaj piedojn ; oni ŝnure ligis, ;
neglektante sakrojn, petojn ;
tuj lin rehejmigis.

'15 Ĉe kolono sur verando ;
staris Alo Dino, ; kiam al li
kun demando ; turnis sin l'
edzino: "Nu, ĉu saĝe, Alo
Dino ; en la preĝon plekti ;
kontraŭ ruzo de l' edzino ;
volu min protekti?!"

'16 Alo Dino klinis kapon, ;
iĝis pia viro, ; ĵuris preĝi ĉiun
tagon ; dece laŭ deziro ĉar
de tiu damna tago ; sciis Alo
Dino: ; estas plej infera plago ;
ruzo de l' edzino.)

& Je la naskiĝtago de Zamenhof post la mondmilito:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 1102 paŝoj dum 13 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (1919, Mondo kaj koro, 1921). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Drako Longa, Norda Kantaro #4414, disduigante strofojn kaj versojn. Klarigo (*): '27 Temas pri Trianona traktato enjaro 1920.>

(#Melodio:

<:29>

(/miimimi mire reldo do;do dodo dore miimi;mi mimi mimi milre mi;mi soso fami mimi;

(#Rekantaĵe: redo re rere mire; do rere re; rere mire doTi La;So So LalTi do))?

)×38)+

(&Strofoj:

'1 /Nun pri armil' kaj vi2ro, ;
pri paca batalanto ; el fund' de
l' kor' ekso2nu ; laŭdanta nia
kanto!

(×:; **Bruas danco en halo;
dancu en ĉen'!** ; **Ĝojaj paŝas
ni en esperantokunven'.**)

'2 Ĉar kreis li miraklon, ; la
tutan homan genton ; per am'
unuigontan ; miraklan
fundamenton.

'3 El mondo de l' barakto, ;
malam', batalo, pelo ; li volis
montri vojon ; al alt-brilanta
celo,

'4 kaj montris li la vojon ; de l'
savo kaj de l' bono! ; Sed, ho,
orelojn surdajn ; atingis la
admono.

'5 „Ho, mia kor'!“ li kantis, ;
ĉar kaptis lin doloro: ; Pro tuta
mond' doloris ; la granda
nobla koro,

'6 Por sangverŝanta mondo ; ĝi
sangverŝante batis. ; Kaj kun
doloro fajra ; ĝi amis kaj
kompatis.

'7 Vir' milda kaj modesta, ;
sed forta kaj decida, ; nek
batoj de la sorto, ; nek homa
mok' perfida

'8 starigi povis baron ; al lia
fajrintenco, ; li luktis per
espero, ; obstino, pacienco.
.....

'9 Kaj en batal' li mortis, ; se
ankaŭ ne per sabro. ; Ĉevalo
de l' milito ; galopis tra l'
kadavro,

'10 Lin la Teruro venkis, ; sur
lia freŝa tombo ; baraktis kun
pafita ; flugil' la
packolombo.... ..

'11 Ĉu longe furiozos ; la
pereiga flamo, ; ke ankaŭ ami
povas ; la hom' nur per
malamo,

'12 ke amon al patrujo ; per tio
li ekmontras, ; ke al nacio
fremda ; malbenon
fulmotondras?

'13 Ĉu nin do turmentados ;
eterne la malbeno, ; ke genton
de la gento ; forbaras
malkompreno,

'14 ke al aligentanoj ; la lango
estas muta ; kaj, se parolas,
sonas ; nur blasfemad'
balbuta?

'15 Ĉu do ankoraŭ longe ; la
hont' terura restas, ; ke hom' al
homo lupo, ; kruela lupo estas,
.....

'16 ke patro testamentas ;
malamon al la ido, ; ke venkas
kaj triumfas ; rikane la
perfido?

'17 Ke ruz' diabla estas ; la
diplomata moro, ; ke la
mortigon lertan ; ornamas
brila gloro?

'18 Ke oni masbuĉadon ; en
nom' de Di' aranĝas ; kaj ke la
pli potencaj ; la pli malfortajn
manĝas?

'19 Jen estas mi Hungaro ; per
ĉiu bat' de koro, ; per ĉiu gut'
de sango, ; per ĉiu gut' de
ploro... ..

'20 Mi forte radikiĝas ; en kara
ter' nacia, ; el ĝi suĉita estas ;
ja tuta forto mia.

'21 Kaj volas mi, ke ĝia art', ;
manier', kulturo ; kunbrilu en
la pompo ; de l' paca
mondkonkuro

'22 Ĉar per pereo ĝia ; pereus
io bela, ; perdiĝus kvazaŭ unu
; kolor' de l' ark' ĉiela.

'23 Etendas mi la brakojn ; por
frata ĉirkaŭpreno ; malsate je
konsento, ; soife je kompreno
.....

'24 kaj streĉas sin rigide ; al
manoj miaj pacaj ; indulge ne
manplatoj, ; sed pugnoj nur,
minacaj.

'25 Forsonas en dezerto ; la
plorobtuza voko. ; Ho mian
sekan gorĝon ; kunpremas jam
sufoko.

'26 Detruas en animo ; terura
kataklismo: ; Amata mia lando
; baraktas en abismo!

'27 Ho, super ĝia kapo glav' ;
Damoklesa pendas, ; al la pli
promesinto ; landpartojn oni
vendas.*

'28 Kaj ploras, ĝemas, plendas
; la forŝiritaj korpoj, ; samkiel
ĉe la tombo ; de la patrin' la
orfoj.

'29 Mi tamen ne blasfemas, ;
malbenojn mi ne sendas, ;
laciĝis jam la brakoj, ; de
longe sin etendas.

'30 Nun ilin, kun la lasta ;
eksving' de l' malespero ;
eklevas mi, kriante ; el maro
de l' sufero:

'31 Ho, vi spirit' benata ; de l'
paca batalanto ; estingu la
inferon ; de la nacia vanto!
.....

'32 Ekfulmu via lumo ; en
malespera nigro, ; ke
ektiminte kuru ; la diskarnanta
tigro,

'33 la tigro verdokula ; de l'
malkonkord', ĵaluzo, ; de l'
rabinstinkt' nacia, ; de la
perfida ruzo,

'34 ke estu fine sekaj ; la
fontoj de la ploro ; kaj unu la
ŝafaro, ; kaj unu la pastoro.
.....

'35 Ke ŝultro ĉe la ŝultro ;
laboru ĉiu lando, ; kunplektu
ilin forte ; de l' amo
florrubando.

'36 Sur via kun adoro ;
florornamita tombo ; ekflugu
kun sonanta ; flugil' la
packolombo.

'37 Kaj kiel Dioniza ; festen'
per unu fojo ; ekmuĝu tra la
tero ; la ditiramb' de ĝojo,

'38 ke fine, sub la signo ; de l'
verdaluma stelo, ; alvenu, ho
alvenu ; sur teron la ĉielo.
)

& Per espero al despero:

< Rekante 27 el 53 batoj por strofo, entute 1113 paŝoj dum 13 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof du unuajn poemojn (Per espero al despero, Pardubice 1910), "Ĉe la forno" dediĉe "Al sinjoro Ed. Kühnl" kaj du lastajn (Kion la vivo alportis, 1911), "Respondo al sinjorino Mar. Hankel" kun moto "Feliĉe la vorto "Despero" ne ekzistas. (El privata letero de M. Hankel.)" kaj "Finalo" kun moto "Elrigardadis, kiel se gutoj da sango ŝprucus supren el la akvo (El "La virineto de maro" de Andersen-Zamenhof.)". Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo .>

(#Melodio:

((#: /MiLa LaSi LaTi domi mido; doLa doTi LaSi LaLa LaMi;
FaFa FaSo FaMi ReFa LaLa; LaTi dodo dodo TiSi MiMi; LaTi
dodo domi TiSi La La;

(#Rekantaĵe: do dodo doTi domi mido; doLa Ti TiLa Si Mi; Fa
FaSo FaMi ReFa La; Lado do doTi Si Ti; La domi mido TiSi Ti
La a)

)×21)+

(&Strofoj:

,& Desperanto:

'1 /Dolĉe sonas via nova
nomo, ; ho Espero, nia bela
vorto! ; En la nokto plena je
sopiro ; Vi, Espero, estas
eliksiro, ; sed nur eliksiro sen
la forto.

(×: Plankon per paŝoj ni
paradu ; kaj rakonton
kantadu ; bele balancu la
balad' ; kosmo estas en ĉeno
; Plankon per paŝoj ni
paradu.)

'2 Kontraŭ ĉio estas vi rimedo,
; kiel kontraŭ superakvo
muro,; sed vi estas sabla
bariero, ; ĉiam disfalanta en
aero, ; sed ni kredas je vi sen
murmuro.

'3 Tre agrabla vere estas
sonĝo, ; ankaŭ sonĝo pri la
estonteco, ; pri senĉesa homa
harmonio, ; unu amo, unu
familio, ; - sukeraĵo por la
infaneco.

'4 Ni atendas vane tempon
belan, ; kiam regos sole via
nomo. ; En eterna monda
karuselo ; vi Espero restos
ĉiam stelo, ; ĉiam
malproksima por la homo.

'5 Eĉ se iam jena tempo venos
; post jarmiloj, kaj post
miliardo, ; tiam ree homon
batos homo, ; sed li batos lin
en via nomo - ; ankaŭ kun la
stelo sur standardo.

,& Ĉe la forno:

'6 Nun mi ree sidas en la niĉo,
; ree hejme ĉe la propra forno,
; post ekskurso en la vastan
mondon, ; mi retrovis mian
propran rondon, ; sed en koro
restis akra dorno.

'7 Lumaj revoj, plenaj je la
suno ; ekbriletis al mi,
soifanto, ; kaj al ili, bela
utopio, ; eksoniĝis mia
melodio, ; mia longe ripozanta
kanto.

'8 Mondo ŝajnis al mi plej
perfekta, ; malaperis ĉie
dolorĝemo, ; kaj sur juna,
nova, bela tero ; paŝis homoj
plenaj je espero,; ornamitaj
per la diademo.

'9 Ho vi revoj, miaj belaj
revoj, ; kial vi disfluis en
aero? ; Mi ja vin nur delikate
tuŝis ; kaj subite vi sur tero
kuŝis, ; sur reala kaj sur kota
tero.

'10 Nun mi sidas ree ĉe la
forno ; en la mezo de la
familio,; kaj el mia vundtuŝita
koro ; malaperis ankaŭ la
memoro ; pri vi, revoj, bela
utopio.

,& Respondo al sinjorino Mar. Hankel:

'11 Viajn belajn vortojn pri la
mondo, ; pri la vivo, nia
malforteco, ; pri la fina venko
de la amo, ; pri la fino de la
homa dramo,; mi ne povas lasi
sen respondo.

'12 Nun mi estas ankaŭ
konvinkita, ; ke feliĉo, kiun
homoj serĉas ; en la sferoj tute
sen la nomo, ; loĝas en la kor'
de ĉiu homo, ; kiel ia ĝermo
parazita.

'13 Oni devas nur ĝin lasi
ĝermi, ; ne timigi ĝin kaj ne
forpeli; ĝi ja estas delikata
semo ; kaj precipe kontraŭ
dolorĝemo ; oni devas forte
koron fermi.

'14 Ho, mi pensas, ke en mia
koro ; dormas ankaŭ iom da
feliĉo, ; ke la ĝermo estas tute
viva, ; ke doloro estis nur
fiktiva ; kaj senbaza ĉiu mia
ploro.

'15 Mi promesas al Vi,
sinjorino, ; ke mi flegos tiun
mian semon, ; ke mi pereigos
tiun vermon,; mordaĉantan
delikatan ĝermon ; ĝis al tuta
ĝia elimino.

'16 Mi promesas ankaŭ sen
fanfaro, ; ke en tuta mia posta
vivo ; mi la vorton "Desper"
ne eldiros ; kaj neniam ankaŭ
mi deziros, ; ke la vort' paradu
en vortaro.

,& Finalo:

'17 Nur momenton inter vi mi
estis, ; nur momenton sonis
mia kanto, ; ree vokas vivo

ordinara, ; vivo al mi ĉiam plej
avara, ; malfeliĉa sort' de l'
pilgrimanto.

'18 Al aliaj mi la vojon lasas, ;
kie mi nur paŝis per hazardo. ;
En la mondo nova, ideala, ;
devas soni nur kant'
najtingala, ; gaja kant' de l' pli
feliĉa bardo.

'19 Nur antaŭen devas mondo
flugi, ; ĉiam supren, supren,
for de l' tero, ; kaj al tiu
mondo hela, nuna,; apartenas
nur la kanto suna, ; kant' sen
dubo kaj sen malespero.

'20 Kies koro sangas
ekvundita, ; tiu nur sin kaŝu en
la domo; ne al homoj, kiuj
ploras, svenas, ; al fortuloj
mondo apartenas, ; nur al
sana, forta superhomo!

'21 Oni diras, ke la dioj ankaŭ
; kontraŭ sia sorto ne batalas ;
Simpla, ĉiutaga bagatelo-! ; en
la maro drona sunu stelo - ;
Fino! Fino! - - ; - - La kurteno
falas.)

& Literatura reviviĝo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 1120 paŝoj dum 13 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj feroa melodio kaj rekantaĵo kiel por Sagaca knabino . Klarigoj (*): '8 Elparolu: Ĵan Kuto'. '12 Tombon de faraono Tutanĥamono malkovris en 1922 arĥeologo angla.>

(#Melodio:

(# Brúsajøkils kvæði: <:29>

/do TiLa LaLa SooFaFa LaLa LaSo LaLa; do TiLa LaLa
SooFaFa dodo doTi LaLa;

(#Rekantaĵe: LaaLaLa LaLa SoFa FaFa SoLa; LaaLaLa LaSo
FaSo La; LaaLaLa LaLa doorere redo Ti La;)

)×38)+

(&Strofoj:

,& Unua:

'1 ... /Kaj tiu ĉi Librejo, la
"Centra" laŭ difino, ; Fariĝas
ĉiunokte sorĉregno de feino.

(×:Reĝo li luktas kontraŭ
ogroj klinge ; Estas la veloj
ruĝa silk' ; Drakŝipo kuras,
ludas remiloj inge.)

'2 Dum tag' – mi tion scias, –
en paco kaj silento ; Sub ŝirma
polvtavolo de jam kvaron-
jarcento

'3 Ripozas sur la bretoj,
laŭlonge de l' kvar muroj, ;
Binditaj belaj libroj najbare
kun broŝuroj

'4 Kaj sen reklama bruo,
samkiel Esperanto, ; Atendas
eblan venon de ebla aĉetanto...
.....

,& Dua:

'5 Noktmeza hor' sonoris.
Ankoraŭ ĝiaj vibroj ; Akorde
kaj signale tremetas sur la
libroj

'6 Kaj jam de ĉiuj partoj, de l' planko ĝis plafono, ; Tra ĉiuj librofakoj laŭtiĝas flustra tono,

'7 Kaj sorĉe enkorpiĝas klasike famaj nomoj ; Kaj are rondodancas la svarmo de fantomoj... ..

,& Tria:

'8 Sokrato de Jean Couteaux*, fumante sian pipon, ; Timtremas, ĉar dumtage revidis li... Ksantipon!

'9 "Ne estis ŝi! – sed tamen portreto tre simila," ; Al li konsole diras Barbiro de Sevilla.

,& Kvara:

'10 Ifigenio ĉasta kun Halka kaj Karmeno ; Babilas pri sukceso ĉe l' Kvara en Dreseno.

,& Kvina:

'11 La Prus'a Faraono kun ironia rido ; Pretendas, ke pli certe ol ŝtona piramido

'12 Eterna polvtavolo ĉi tie lin protektas, ; Ĉar, ke li tie kuŝas... la Angloj* ne suspektas!!

.....

,& Sesa:

'13 Sed jam responde tuisis signife kun ekspiro ; Makbeto, krima reĝo el lando de Ŝekspiro (*),.....

,& Sepa:

'14 Hamleto, la heroo de majstra tragedio, ; Sidante tre komforte sur la Krestomatio,

'15 Por fine konatiĝi kun sia la aŭtoro ; Nun lernas l'Anglan Lingvon kaj eĉ Sen Profesoro!

,& Oka:

'16 Sed ĵus aŭdiĝis voĉo el supraj bretetaĝoj... ; Ha vi, Georgo Dandin! – El netranĉitaj paĝoj

'17 De paliĝinta libro sopiraj vortoj sonas: ; "Mi – kvankam kiel Reĝo de l' Montoj supre tronas, –

'18 Nun sidas Sub la Neĝo de l' polvo lastetaĝa ; Kaj En Malliberejo – (libreto tridekpaĝa)

'19 Tutsola kun Frenezo – (du aktualaj dramoj).

,& Naŭa:

Sopiras al Misteroj de Amo miaj flamoj

'20 Kaj lumas jam la Verdaj Fajreroj de l' printempo; Pretiĝu al Eliro, ankoraŭ estas tempo,

'21 Kaj al Vojaĝ' Interne de Mia ĉambro! – Certe!" ; Kaj tiel parolinte Georg' simiolerte

'22 Degrimpis de l' supraĵo kaj tra la Proverbaro ; Alvenis kun Bukedo ĉe Virinet' de Maro,

'23 Ŝi estis tiu Marta, ĉe kiu antaŭ longe ; Li gasto estis en la Kastelo de Prelongo;

'24 Krom danko li ankoraŭ al ŝi – pro pruntedono – ; Ŝuldadis la Sentencojn de l' Saĝa Salomono.

'25 Fatala Ŝuldo, ho ve! (de sinjorino Cense)... ; "Ĉu li? – La Avarulo!" ŝi kriis kaj kompanse,

'26 Postforta Vangofrapo, (traduko de Ŝo Saro) ; Insultojn serĉis en la Marista Terminaro.

'27 ... Batalo de La Vivo... Mistero de Doloro... ; Sed li sin senkulpigis, almenaŭ pro l' honoro:

,& Dek:

'28 "Mi havis Travivaĵojn" li diris "pli ol Ro Ŝo! ; Min kaptis la Rabistoj kaj ve, en mia poŝo

'29 Neniu mono restis, ne eĉ la... Readmono! ; Hontinde trabatita pli ol Amfitriono

'30 Sur Fundo de l' Mizero mi rampis tra mallumoj ; Kaj vagis Tra La Mondo... (entute du volumoj!)

'31 En tiuj ĉi Abismoj vi estis balzamguto, ; Nur vi, Mirinda Amo, kaj... Solo nur de Fluto!"

,& Dek unua:

'32 Tuŝite ŝi pardonis al sia koramanto ; Kaj harmonie sonis l' Interrompita Kanto...

,& Dek dua:

'33 "Kiel Ni Plibeligos la Vivon?" diris Marta, ; "Ho venu nur," li flustris, "sur bretangul' aparta

'34 Ni kuŝos sur la Laŭroj, parolos pri... Patreco ; En ama ĉirkaŭpreno, en ĉarma feliĉeco!

'35 Ni bone amuziĝos, ĉar tie sur la breto ; De longaj jaroj restas leginda volumeto..."

,& Dek tria:

'36 Kaj Marta kaj Georgo, (ĉu nur pro scivolemo?) ; Okupis sin ververe pri tre scienca temo,

'37 Kun intereso, senbrujaj ekkrioj, ; "Pri Unu Speco de Kurbaj Linioj"

'38 Jen estas la titolo...

,& Dek kvara:

Sed lumas jam l' aŭroro, – ; Silenton! – Baldaŭ venos, ĉu ne, La Revizoro!

& Ebe Skamelido:

< Rekante 7 el 23 batoj por strofo, entute 1127 paŝoj dum 13 minutoj. Norda Kantaro #4484. El sveda tradukis Kukoletto (LORÉ). Duoble tradukiĝis strofoj '1 kaj '35. Klarigoj (*): '5 Aŭf nokto = dum nun venonta nokto. '6 Tej = tie. '8 Jununjes = de junulino. ; Zibelo: ties luksa felo, martesita. '12 Stas = estas. '23 Lando: Nuntempe provinco. '24 Doni la manon = manskue promesi.>

(#Melodio:

<:1> ((2× /LaLami /sosomi /famii /dodo;mi /miremi /TiTire (/do '1 /o; '2 /oo;;Ti)? (/re '1 /do; '2 /doo;;Ti) /LaLaSo /doree /mifaa /miire /dodoTi /La /a)×48)+

(&Strofoj:

'1a /Skamelev /loĝis sur
/Tidin/sulo ; li /estis kaj /riĉa
kaj /for/ta ; /bravajn /bredis li
/filojn /kvin, /du estis
/malbon/sor/taj ; Ĉar /migras
ja /Ebev /Skamel/idov /en
sova/ĝej'.

'1b /Skamelev /loĝis sur
/Tidin/sulo ; en /riĉo /kaj
po/ten/c' ; /bravajn /bredis li
/filojn /kvin, kon/traŭis al du
/provi/den/c'

(×:; Ĉar /migras ja /Ebe
/Skamel/ido /en sova/ĝej'./)

'2 /Tri jam /estas /mo2r/taj ;
kaj /du do /vivas /plu/ ; Mi
/volas je /vero /di2/ri ; ili
/lertas /en kor/tu/m'

'3 /Estis /Ebev /Skamel/idov ;
ĉe/vale /selojn me/ti/gas ;
"/Rajdos /mi al /la in/sul' ;
jun/unjon Lu/ciavn vi/zi/ti"
.....

'4 /Estis /Ebev /Skamel/idov ;
li /rajdas ju/nunjan bi/e/non ;
/staras ek/stere ju/nunjo
Lu/ciav ; vol/vita /en mu/ste/lo
.....

'5 "Vi /staras /jen, ju/nunjo
Lu/ciav ; vol/vita /en mu/ste/l'
; Ĉu /donos al /mi vi /loĝon
aŭf /nokt'* ; kaj /estos al /mi
amfi/de/l'?"

'6 "Ja /havos vi /loĝon ĉi /tej*
aŭf /nokt ; kaj al /viaj ĉe/valoj
/man/ĝon ; sed /mia pa/trino
res/po2n/dos ; pri /tiaj /gastaj
a/ran/ĝoj"

'7 "Vi /iru /en la /do2/mon ;
dis/kuti kun /mia pa/tri/n' ; Mi
/iros /en la /ŝtondo/meton ; por
/mikso je /medo kaj /vi/n'."

'8 "Vi /sidas /jen, ju/nunjes*
pa/trin' ; vol/vita /en zi/be/l'* ;
Ĉu /donos ju/nunjon Lu/ciavn
/vi ; al /mi por /amfi/de/l'?"
.....

'9 /Estis pa/trino de l'
/ju2/nunjo ; ŝi /tiel res/pondi
/po/vas ; "Al /vi mian /karan
fi/linon mi /donos ; se /ŝin vi
/plaĉa /tro/vas"

'10 "Aŭs/kultu, /eta Lu/ci2/av ;
ĉu /volas vi /min a/ten/di ;
/dum mi /servas en /reĝa bi/en'
; kaj /lernas ba/tali /blen/de?"
.....

'11 "/Vin mi a/tendos dum
/vi2n/troj ; kaj /eĉ dum /vintroj
/du/ ; /Vin mi a/tendos ti/oman
/tempon ; /kiom laŭ /via
pos/tu/l'."

'12 /Ebev li /servas en /reĝa
bi/en' ; /kaj pro /oro kaj /glo/ro
; /hejme stas* /Petrev, la
/fra/to ; for/logas la /amon de
l' /ko/ro

'13 /Estis /Petrev /Skame/lidov
; sin /vestas je /purpur/fe/l' ;
kaj /iras /en la /viri/nejon ;
Lu/ciav /eta la /ce/l'

'14 "Vi /sidas /jen, ju/nunjo
Lu/ciav ; kaj /kudras
ves/taĵojn /fra/ĉjajn ; /Ebev li
/servas en /reĝa bi/en' ; li /vin
kaj in/sultas kaj /kra/ĉas"

'15 "Ja /bele /servas mi
/E2/bevn ; kaj /min bele
/servas /li/ ; ne/niam li /kraĉus
ju/nunjon fi/eran ; kaj /eĉ
mal/pli al /mi/"

'16 "Aŭs/kultu /nun, ju/nunjo
Lu/ciav ; mi /estu /via fi/an/ĉ' ;
ja /helpu min /ĉionpo/tenca
/Dio ; ke /Ebevn mor/tigis
/tran/ĉ'."

'17 "Se /estas /vero, kaj /diras
/vi ; ke /Ebevn mor/tigis
/tran/ĉ' ; do /helpu /min la
e/terna /Dio ; vi /estu /mia
fi/an/ĉ'."

'18 Ili /bakas /kaj bi/eron
/faras ; pre/paras la /nupton en
/ka/ŝo ; /Ebev ser/vanta en
/reĝa bi/en' ; pri/songas /ĉiun
/pa/ŝon

'19 /Ebev li /songis /songon
dum /nokt ; ku/ŝanta /en la
/li/t' ; Ma/tene /li ve/ki2/ĝis ;
kaj /diris al /stala a/mi/k'

'20 "Mi /songîs ke /mia /ruĝa man/tel' ; blu/iĝis /je ko/lo/r' ; kaj /songîs /mi ke la /bona ĉe/valo ; /mia /kuris /fo/r"

'21 Res/pondis /lia /stala a/miko ; ves/tita en /ruĝa pur/pu/r' ; "/Vian /fian/ĉi2/non ; for/logas a/lia ju/nu/l'

'22 /Ebev /metas ve/sta2/ĵojn ; kaj /vestas sin /per man/te/l' ; kaj /iras /li en /altan /halon ; al /sia /graca /re/ĝ'

'23 "Ho, /graca /reĝo, per/mesu /min ; hejmen/iri al /patra /lan/d'* ; ĉar /oni /diris ke /patro /mortis ; kaj /ter' en a/lies /man'/"

'24 "/Pe2r /meson /havos /vi ; vo/jaĝi al /via /hej/m' ; /Donu al /mi vian /manon* /ke ; vi /nepre /venos /re/"

'25 /Ebev fe/riis /ek de l' ar/meo ; vo/jaĝis al /sia hejm/lan/d' ; ve/turis /li al /Tidin/sulo ; per /plej ra/pida /plan/d'

'26 /Kiam /Ebev /Skame/lidov ; /venis al /patra bi/e/n' ; eks/tere /ambaŭ fra/tinoj /staras ; vol/vitaj /en mus/te/l'

'27 "Jen /staras /vi, fra/ti2/noj ; vol/vitaj /en mus/te/l' ; /Kial /tiom da /ho2/moj ; /venis /al bi/e/n'?"

'28 Res/pondis /la plej /ju2/na ; dum /vange /larma /flu'/ ; "/Nia /frato /Petrev /trinkas ; /nupton kun /via ka/ru/l."

'29 Al /unu li /donis or/krucon sur /brust' ; a/lian je /ruĝora /rin/g' ; "Sa/lajris /mi en /reĝa bi/en' ; kaj /celis al /fian/ĉi/n'."

'30 /Ebev tur/nigas ĉe/valon al /malo ; kaj /volis /rajdi /fo/r ; /Lin post/kuris fra/tinoj /du ; kaj /petis lin /resti en /ko/rt'

'31 La /panjo /kaptis bri/dilon kaj /tenis ; lin /petis /resti /hej/me ; Ŝi /tion /pentis mult/milan /fojon ; ke /ne lin /lasis /raj/di

'32a /Ebev en /domon /i2/ras ; sa/lutas al /ĉiuj /ben/koj ; Lin /fraĉjo /igis ar/ĝentkruĉon /manen ; kaj /petis al /novedzin' /trin/ki

'32b /Ebev en /domon /i2/ras ; sa/lutas al /ĉiuj /gas/toj ; Lin /fraĉjo /igis ar/ĝentkruĉon /manen ; kaj /petis al /novedzin' /tos/ti

'33 /Ebev /tostis por /longa /tago ; /per kaj /medo kaj /vi/n' ; /Ĉiu ri/gardo al /noved/zino ; lar/migis /vange /li/n

'34 /Venas /do ves/pe2/ro ;
noved/zino al /lito /vo/las ;
/Ebev kaj /eta Lu/ci2/av ;
/longe /ili pa/ro/las

'35 Kaj /diris /Ebev
/Skame/lidov ; kon/dukas ŝin
/supren al /ce/l' ; "/Ĉu
me/moras vi, /eta Lu/ciav ; vi
/ĵuris al /mi pri fi/de/l'?"

'36 "/Ĉiun fi/delon ĵu/ritan de
/mi ; mi /donis al /via /fra/to ;
Dum /ĉiuj /tagoj de /mia /vivo
; mi /estos pa/trino ans/ta/taŭ
.....

'37 "Mi /ne fi/anĉis pa/trine
/vin ; /nek je /bofra/ti/no ; sed
/ke vi /estu por /mi fian/ĉin' ;
kaj /kore /ama/ti/no

'38 /Estis /Ebev /Skamel/idov ;
/li per /glavo /for/tis ; /Estis
/eta Lu/ci2/av ; sub /liaj
pi/edoj /mor/tis

'39 /Estis /Ebev /Skamel/idov ;
li /kuris /en la /fes/ton ; Li
/estis /tiom ko/le2/ra ; kaj
/glavo ti/rita sub /ves/to

'40 "/Noved/zinon mi /sekvis
al /lito ; ke /ŝiaj /sonĝoj /ĉe/su
; kaj /sciu /vi, mia /fra2/to ; ke
/vin mi /ne for/ge/sos"

'41 /Estis /Petrev, la /fra2/to ;
res/pondis /urĝe /li/n ;
"Vo/lonte /mi vin /lasos
/dormi ; ĉi/nokte kun
/noved/zi/n'."

'42 /Estis /Ebev /Skamel/idov ;
el/prenis /sian /gla/von ; /Estis
/Petrev, la /fra2/to ; li /mortis
pro /tiu sen /sa/vo

'43 La /patron li /vundis
mor/ti/ge ; Al /panjo per/diĝis
/ma/n' ; Ĉar /migras ja /Ebev
/Skame/lidov ; en /sova/ĝeja
/lan/d'

'44 /Estis /Ebev /Skamel/idov ;
li /saltas /sur ĉe/va/lon ; kaj
/fuĝas /li ar/ba2/ren ; Lin
/kaŝas plej /bone ar/ba/ro

'45 /Estis /Ebev /Skamel/idov ;
/iras /al for/ĝi/st' ; al /si
for/ĝigas /ringojn el /fero ;
/ĉiujn el /nova kon/si/st'

'46 /Estis /Ebev /Skamel/idov ;
ka/tenigas /manojn kaj
/kru/rojn ; Vo/jaĝos /li
pil/gri2/me ; kom/pensi /siajn
/pe/kojn

'47 /Estis /Ebev /Skamel/idov ;
siajn /manojn /kate/ni/gas ; kaj
/ili /restu dum /longa /tempo ;
ĝis /ili /mem rom/pi/ĝas

& Knabinoj de Muhu:

< Rekante 21 el 41 batoj por strofo, entute 1148 paŝoj dum 12 minutoj. Estonan fabelon poemigis Julio Baghy (Ĉielarko, Tenerife 1966). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,6:41> (

/Do DoRe MiMi FaFa MiMi; So TiLa SoSo FaFa MiMi; Mi
ReRe FaMi ReTI DooLA;LA SOSO DoDo TITI Do Do;

(#Rekantaĵe: Re ReMi FaRe; Mi MiFa SoMi; La LaTi doLA So;
LaTi doLa SoFa Mi Mi Do; Re ReFa MiRe Do o)

)×28)+

(&Strofoj:

'1 /Ĉe mara bord' de Estonio, ;
sur Muhu, insulet' proksima, ;
legende vivas historio; pri
pens' bizara, junulina.

(×:; **Brakon al brako ; plekte
kaj rekte ; iras ni en la danc'
; Gaje kantu en amika ĉen' ;
iras ni en la danc'.**)

'2 Jam pasis pli ol du
jarcentoj, ; ke post milito
sveda-rusa ; vandalan krudon
de l' taĉmentoj ; tuj sekvis
plago pune plusa.

'3 La revenintojn el la marĉo ;
atendis hejmoj cindriĝintaj. ;
En procesie laca marŝo ; nur
trenis sin la hejmperdintaj.

'4 Dum veo... preĝo... sakro
ĝemis ; kun peto... pugnoskua
gesto, ; ŝtelire nova monstro
venis, ; falĉil-armila gast': *la
pesto.*

'5 Abunde la falĉil' rikoltis ;
pasante plu de lok' al loko; pri
ĝia tiranec' heroldis ; arme'
kadavra sen tombroko.

'6 Nek preĝo, nek ribelo
helpis; surdmuto regis en
Ĉielo... ; Responde nur la
hundoj jelpis, ; ululis strigoj
sub la steloj.

'7 Vilaĝoj senhomiĝis tute...;
Forkuri senespera ŝajnis;
fuĝanto spita absolute; en lok'
alia samon gajnis... ..

'8 Sed malgraŭ morno kaj
hororo ; la herboj, arboj freŝe
verdis, ; bukedo kampa sub
sunoro ; neniom el la ĉarmo
perdis... ..

'9 Simile al la bunt' de l'
kampo ; sur plac' de l' balancil'
vilaĝa ; knabinoj staris kiel
stampo ; pri venkovolo
vivoplaĉa.

'10 Knabinoj dek du – mem
juneco ; kaj vivofontoj
korpiĝintaj – ; jam pretaj doni
sin kun deco ; al viroj paruliĝi
indaj... ..

'11 Knabinoj dek du... Sed
dek-tria ; de l' stratofino
proksimiĝis... ; Funebris jam
mieno ŝia... ; Por scii certan ja
sufiĉis.

'12 Ĝemelfratino ŝia pasis; de
tero for al transa spaco ; kaj
orfe sola ŝin postlasis ; por
tremi plu pro mortminaco.

'13 Knabinoj dek du sin retiris
; kaj time gapis al dek-tria, ;
sed jen el ili Ebu iris ; renkonti
ŝin kun koro kria:

'14 "Al nia rond' mi vin
invitas. ; Ne timu preni mian
manon! ; Ni saman sorton ne
evitas ; eĉ nin tirante en
kabanon.

'15 Se morti devas, mortu saĝe
; kaj inde al knabino brava! ;
Ekiru rekte kaj kuraĝe ; al
Morto, nin de pesto sava.

'16 De pest' strangoli vin ne
lasu, ; ne iĝu nur ŝvelaĵ' por
hundoj, ; tra vejnoj formikar'
ne pasu, ; nek bekoj boru en la
vundoj!

'17 Ni restu belaj kaj, neglekte
; detruan tuŝon de la pesto, ; la
brakojn al la brakoj plekte ; ni
kune marŝu al finfesto!"

'18 Dek tri knabinoj hejmen
kuris, ; post hor' revenis al la
placo. ; La vangoj pro l' rapid'
purpuris, ; okuloj ardis pro l'
aŭdaco.

'19 Revestis sin dek tri
knabinoj, ; sin freŝe lavis,
harojn kombis; kun kronoj kaj
en blankaj linoj ; princine
belaj ili pompis.

'20 La buntaj ŝtrumpoj, lanaj
jupoj ; samritme ondis ĉiupaŝe
; kaj ili ŝajnis anĝelpupoj, ; de
Di' ŝtelitaj teren kaŝe.

'21 Surplace ili faris ĉenon; al
ĉiu brako brak' sin plektis ; kaj
stratolarĝe la promenon ; al
maro ili ekdirektis.

'22 "Fratinoj, supren kapon,
koron! ; Spitante peston ĝin ni
mokos. ; Jarcentoj gardos la
memoron ; kaj nin al Vivo
reprovokos.

'23 Fratinoj kantu, sed
plenvoĉe ; laŭdante vivon pro
la Vivo! ; La kantoj sonu
senriproĉe ; dum marŝas ni sur
vivdeklivo".

'24 Plenpulme kantis la
knabinoj ; marŝante inter
domoj fulgaj; malice mutis la
ruinoj ; kiel kripluloj
senindulgaj...

'25 Korŝire sonis kanto gaja ;
pri vivobelo, juna amo, ;
paruldonaca tempo maja, ; pri
dolĉa kuno en kabano...

'26 Dek tri knabinoj ornamitaj
; atingis golfon de la maro ;
kaj senhezite pestospitaj ;
sinĵetis marŝe al ondaro...

'27 De paŝ' al paŝo dum la
marŝo ; la kanto eĥoserĉe
sonis ; ĝis voĉoj de l' funebra
farso ; formorte en marakvo
dronis.

'28 Super la akvo ondodanca ;
malsataj mevoj kriĉe krozis, ;
sur la surfaco ondbalanca ;
florkronoj dek tri flosis...
flosis.)

& Husaro:

< Rekante 23 el 43 batoj por strofo, entute 1247 paŝoj dum 14 minutoj. Verkis Puŝkin?. El rusa tradukis ? Vasilij Devjatnin (Verkaro de V. N. Devjatnin, Hachette, Parizo 1906). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,5:43> (/do dore doTi LaSo dodo; so sola sofa mire soso; do dore doTi LaSo dodo; so sola sofa mire mimi;

(#Rekantaĵo: fa faso lafa mifa somi; re refa mire domi somi; fa faso lafa mifa somi; re refa mire domi somi reTi do o))×29)

+

(&Strofoj:

< El Puŝkin.>

'1 Ĉevalon sian li purigis, ;
Estante forte kolerega, ; Kaj
diris: "min diabl' devigis ; En
loko loĝi malbonega!

(×: **Vivi ĉe sino de virino ;
Kun ruĝa vino kaj destino ;
Drinki ĝin tage kaj sen fino ;
Vivi ĉe sino de plej ĉarma la
virin'.**)

'2 Ni ĉiam tie-ĉi restadas ; En
turka kvazaŭ batalado: ; Nur
solan supon ni manĝadas ; Kaj
eĉ ne pensas pri drinkado.

'3 Kaj mastro tie-ĉi malbona, ;
Malbonan havas li edzinon. ;
Nek via skurĝ', nekn vorto
bona ; Admonas tie-ĉi virinon!
.....

'4 Jen urbo Kiev! lando kia! ;
En buŝon falas mem buletoj, ;
Kaj vinon havas domo ĉia, – ;
Kaj kiaj tie virinetoj!

'5 Ne estas eĉ domaĝ', je Dio, ;
Sin mem pro ili pereigi! ;
Malbone estas nur per tio..." ;
– Per kio? Volu min sciigi! –
.....

'6 Kaj li komencis plibonigi ;
Lipharon. "Eble ne timulo – ;
Li diris – estas vi, sed igi ; Vin
miri povas mi – spertulo."

'7 "Aŭskultu: regimento nia ;
Ĉe Dnepro larĝa enlokiĝis. ;
Mastrino estis bona mia, ; Kaj
tombon ŝia edz' foriĝis.

'8 Kun ŝi mi baldaŭ amikiĝis;
Ni vivis pace, tute bone, ; Al
mi mario humiliĝis, ; Ne diris
vorton eĉ malbone.

'9 Se mi malsobra estis tute, ;
Ŝi mem min zorge kuŝigadis;
Ŝi ĉiam pace, sendispute ; Je
ĉio tuj mem konsentadis

'10 Feliĉan vivon mi pasigis, ;
Kaj longe tiel vivus eble, – ;
Sed jen subite ĵaluzigis ; Min
io, – mem diabl' kredebble.
.....

'11 Mi pensis: kial baptonino ;
Sin levas nokte? Kiu volas? ;
Tre juna estas ŝi virino ; Kaj
tial, eble, ŝi petolas!

'12 Mi observadi ŝin intencis. ;
Jen foj' ne dormis mi (en korto
; Jam estis nokto, kaj
komencis ; Bruegi vent' kun
granda forto).

'13 Kaj vidas mi: ŝi
forrampetis ; De forno, prenis
ŝi karbeton, ; Min tre facile
pripalpetis ; Disblovis apud
forn' fajreton;

'14 Ŝi ekbruligis kandleton, ;
Kun ĝi angulon ŝi foriĝis, ; De
tie prenis boteleton, ; Sur
balailon ŝi sidiĝis,

'15 Ŝi senvestiĝis, kaj sorbinte
; El boteleto, ŝi tra tubo, ; Sur
balailo sidiĝinte, ; Tuj
malaperis, kvazaŭ nubo!

'16 "Ŝi eble estas sorĉistino", ;
Mi pensis, kaj de forn' rapidas,
; Por vidi sorĉon de virino;
Kaj jen mi boteleton vidas.

'17 Mi flaris: ia acidaĵo... ; Mi
plankon verŝis el botelo: ;
Forflugis – kia mirindaĵo! – ;
Kaj forna forko kaj sitelo!

'18 Sub benko katon mi
ekvidis, ; Sur ĝin mi ŝprucis el
botelo: ; Ĝi ternis tuj kaj
ekrapidis ; Subite fornon post
sitelo.

'19 Sur ĉion ŝprucis sen
kompato ; Jam mi per tuta
forto mia, – Kaj ĉio: tablo,
benko, pato ; Forflugis unu
post alia.

'20 Al ili mi ne volis cedi, – ;
Kaj trinkis mem per unu fojo ;
restaĵon... Ĉu vi povas kredi? ;
Mi ekaperis tuj en vojo:

'21 Mi flugis, – kien? mem ne
sciis, ; Kun forto tranĉis nur
aeron, ; Al steloj mi: "pli
dekstren" kriis. ; Kaj jen
ekfalas mi sur teron.

'22 Jen mont'. Sur ĝi kaldronoj
bolas ; Kaj oni faras ian ludon:
; Kantadas, fajfas kaj petolas, ;
Kun granda ran' edzigas
judon.

'23 Mi kraĉis... Flugas jen
Mario: ; "For! hejmen kuru,
petolulo! ; Vin oni tuj
formanĝos!..." – Kio?! ; – Nu,
mi ne estas timemulo:

'24 Vi ne kriegu! Kie vojo ; Al
hejmo estas? – "Jen sidiĝu ;
Sur fornan feron, – kun
malĝojo ; respondis ŝi, – kaj
tuj foriĝu!"

'25 – Vi volas, ke husar' sidiĝu
; Sur fornan feron?!
Baptanino, ; Mi petas vin, ne
frenezigu, ; Ne estu vi
malsaĝulino!

'26 – Ĉevalon!... "Prenu,
malsaĝulo!" ; Ŝi efektive diris
veron: ; Jen antaŭ mi ĉeval' –
barbulo ; Per hufo forte batas
teron.

'27 Sidiĝas mi kun brava vido
; Sur ĝin kaj trovi bridon
penas, ; Sed vane! Rajdas mi
sen brido – ; Kaj tuj... al forno
mi alvenas.

'28 Kaj jen mi tion saman
vidas. ; Ĉevalo tute jam
forestas, ; Kaj mi sur benko
rajde sidas: ; Jen kia strang'
okazo estas!" –

'29 Kaj li daŭrigis plibonigi ;
Lipharon. "Eble ne timulo, – ;
Li diris, – estas vi, sed igi ;
Vin miri povas mi – spertulo."
.....)

& Diru ĉiam la veron!:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 1295 paŝoj dum 15 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per sama melodio kiel por Konfeso kaj simila rekantaĵo. Klarigo (*): '24 Monaĥo ne rajtas havi edzinon.>

(#Melodio:

<1,5:37> (

/dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mi; mifa soso somi mire;
dore doTi LaLa LalSo

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; LaTi dodo dore mimi; mifa
somi mire do; do mire do dodo Ti La a)

)×35)+

(&Strofoj:

'1 /Diru ĉiam vi la veron ;
Plenkuraĝe, sen hezit': ; Per
mensogo la aferon ; Vi nur
fuŝas, ho homi2d'!

(×: **Zorge li portas juvelon ;
Kaŝe vortas li la celon ; Ne
mensogas tamen li ; Zorge li
portas juvelon.**)

'2 Se la veron vi sciigas, ; Vin
subtenas Dia man', ; Se
mensogon vi aplikas, ; Vin
englutas la satan'.

'3 Iam fama kapuceno, ;
Elokventa predikanto, ;
veturadis al Aĥeno ; Hejmen
el la belga lando.

'4 En kupe' li sidis sole ; Nur
kun juna sinjorin'; Li meditis
senparole ; Kaj do ne atentis
ŝin.

'5 Estis homo li tre sprita, ;
Bonhumoron ŝatis li; Ofte jam
torento rida ; Sekvis al parol'
de li.

'6 Nun en la kupe' li sidis ;
Jam dum pli ol unu hor', ; Pri
prediko li meditis ; Silentante
kun fervor'.

'7 Sed ekvidis li subite, ; Ke la
juna sinjorin' ; Ja spiregis
ekscitite ; Kaj tremetis eĉ sen
fin'.

'8 La manpoŝon ŝi malfermis, ;
Enrigardis kun ekscit' ; Kaj
rapide ĝin refermis, ; Kvazaŭ
estus li bandit'.

'9 "Estimata sinjorino", ; fine
li demandis ŝin, ; "Kial tremas
vi sen fino, ; Kio do ekscitas
vin?"

'10 "Pastra moŝto, min la timo
; Skuas jam dum tuta hor' ; Pro
l' kontrolo ĉe la limo ; Forte
tremas mia kor'.

'11 Mi nun venas el Bruselo. ;
Mia kara bopatrin' ; Min
ornamis per juvelo, ; Kiam mi
vizitis ŝin.

'12 Estas ora ĝi kolĉeno ; Kun
belega diamant' ; Sed mi loĝas
en Aĥeno, ; Do en la germana
land'.

'13 Kaj la sorto senkompata ;
Lasas ne ĝin porti for. ;
Malpermesas leĝo ŝtata ; La
eksporton nun de or'.

'14 Do kunprenis senpermese ;
Mi en la manpoŝo ĝin. ; Sed
nun timas mi senĉese, ; Ke l'
dogan' konfiskos ĝin.

'15 Centmil frankojn ĝi
valoras ; Estas ĝi por mi
trezor', ; Sed se senkorul'
deĵoras, ; Li ĝin certe prenos
for.

'16 Kun bedaŭra gest'
respondis ; La monaĥo nun al
ŝi: ; "Kial ne antaŭe sondis ;
Ĉiujn cirkonstancojn vi?

'17 Oni fakte ja kutimas ;
Preni juvelaĵojn for, ; Kaj do
ankaŭ mi nun timas, ; Ke
seniĝos vi de l' or'.

'18 Lastan ruzon mi proponas,
; Se vi volas uzi ĝin: ; Ĉiuj
doganistoj konas ; Jam de
longa tempo min.

'19 Do mi provos la aferon, ;
Donu do la poŝon vi! ; Sed mi
diros nur la veron, ; Nepre ne
mensogos mi."

'20 Al la pastro do transdonis ;
Sian poŝon la virin'. ;
Sammomente jam deponis ; Li
en la kapuĉo ĝin. –

'21 Jen la vagonaro haltis ; En
stacio ĉe la lim' ; Ili ambaŭ
teren saltis, ; Li ridante, ŝi kun
tim'.

'22 Kiam la monaĥo iris ; Al
la ejo de l' dogan', ; Oficist'
ridante diris: ; "Jen la pastro
Koloman'!

'23 Ĉu kunprenis valoraĵojn ;
Trans la limon ankaŭ vi, ; Ĉar
direktas viajn paŝojn ; Vi nun
rekte ja al ni?"

'24 Kaj la pastro kun sinklino ;
Diris sen hezit' al li ; "La
kolĉenon de l' edzino* ; En
kapuĉ' kunportas mi."

'25 La sinjoroj laŭte ridis ; Pro
la vere stranga dir' : ; "Pastra
moŝto, ni jam vidis, ; Ke vi
estas sprita vir'!"

'26 Sed la poŝon eĉ elprenis ;
Nun la pastro Koloman' , ; Kaj
montrante li ĝin tenis ; Per
levita dekstra man' :

'27 "Ĉiu, kiu nun deĵoras, ;
Venu do por vidi ĝin! ;
Centmil frankojn ĝi valoras, ;
Kaj mi ne mensogas vin."

'28 Sed la viroj ridis plore ;
Pro gajeco kaj plezur' : ; "Ho,
ni dankas vin elkore, ; Vi ja
certe ŝercas nur!"

'29 "Sed rigardu do ĝin fine! ;
Ne mensogas Koloman'!" ;
Kaj la poŝon li obstine ; Eĉ
malfermis per la man'

'30 "Pastra moŝto, ni
komprenas, ; Vi nur volas
moki nin, ; Kvankam sed vi
tiom penas, ; Tamen ni ne
kredas vin!"

'31 "Ĉu do fakte mi foriru, ;
Sen ke vi rigardis ĝin? ; Sed vi
ne estonte diru, ; Ke la pastro
trompis vin!"

'32 Kaj dum la sinjoroj ridis, ;
Tuj la pastro Koloman' ; trans
la limon forrapidis ; Kun la
poŝo en la man'

'33 Kaj la poŝon li redonis ; Al
feliĉa la virin' , ; Sed li ankaŭ
ŝin admonis ; Dum li adiaŭis
ŝin:

'34 "Diru ĉiam vi la veron, ;
Plenkuraĝe sen hezit'! ; Per
mensogo la aferon ; Vi nur
fuŝas, ho homid'

'35 Se la veron vi sciigas, ;
Vin subtenas Dia man' , ; Se
mensogon vi aplikas, ; Vin
englutos la Satan'."

& Al la Esperantisto:

< Rekante 33 el 65 batoj por strofo, entute 1300 paŝoj dum 13 minutoj. Kvar poemojn kaj unu dediĉon verkis L. L. Zamenhof (, &1 kaj , &2 en Unua Libro por Rusoj, 1887; , &3 en La Esperantisto n-ro 1, 1889; , &4 en Plena lernolibro de la tutmonda lingvo "Esperanto" por Rusoj, 1890; rekantaĵon ĉe foto pri la unua Kongreso de Esperanto en 1905). Baladigis Martin Strid (2017) per islanda melodio.

(#Melodio:

(# A Sprengisandi:

/La do La do LalTi dolTi La do; Ti mi Ti mi Tildo reldo Ti Ti; La do La do LalTi dolTi La do; Ti mi Ti mi Tildo reldo Ti Ti;

(#Rekantaĵe: mi mimi fa fafa fa fafa fa mi; re rere re dodo do dodo Ti Ti; mi mimi fa fafa fa fafa fa mi; re rere re dodo do TiTi La La a)

)×20)+

(& Strofoj:

, &1. Mia penso:

'1 /Sur la kampo, fo2r de2 l' mondo, ; Antaŭ nokto de2 so2mero, ; Amikino e2n la2 rondo ; kantas kanton pri2 l' e2spero.

(×: (Kion disigis ne unu miljaro ; Tion kunigis Bulonjo ĉe l' Maro ;)×2)

'2 Kaj pri vivo detruita ; Ŝi rakontas kompatante, - ; Mia vundo refrapita ; Min doloras resangante.

'3 "Ĉu vi dormas? Ho, sinjoro, ; Kial tia senmoveco? ; Ha, kredeble rememoro ; El la kara infaneco?"

'4 Kion diri? Ne ploranta ; Povis esti parolado ; Kun fraŭlino ripozanta ; Post somera promenado!

'5 Mia penso kaj turmento, ;
Kaj doloroj kaj esperoj! ;
Kiom de mi en silento ; Al vi
iris jam oferoj!

'6 Kion havis mi plej karan - ;
La junecon - mi ploranta ;
Metis mem sur la altaron ; De
la devo ordonanta!

'7 Fajron sentas mi interne, ;
Vivi ankaŭ mi deziras, - ; Io
pelas min interne, ; Se mi al
gajuloj iras...

'8 Se ne plaĉas al la sorto ;
Mia peno kaj laboro - ; Venu
tuj al mi la morto, ; En espero
- sen doloro!

,&2. Ho mia kor':

'9 Ho mia kor', ne batu
maltrankvile, ; El mia brusto
nun ne saltu for! ; Jam teni
min ne povas mi facile (; Ho,
mia kor')×2

'10 Ho mia kor'! Post longa
laborado ; Ĉu mi ne venkos en
decida hor'! ; Sufiĉe!
trankviliĝu de l' batado, (; Ho,
mia kor')×2

,&3. Al la "Esperantisto":

'11 En bona hor'! Ni aŭdis la
signalon, ; Kaj bataleme saltas
nia koro, ; Konduku nin,
komencu la batalon ; Sub bona
stelo, en feliĉa horo!

'12 Amikoj de proksime,
malproksime, ; Salutas vin, ho
nia luma stelo! ; Konduku nin
senhalte kaj sentime ; Al nia
granda, sankta, glora celo!

'13 Ne tre facila estos nia vojo
; Kaj ne malmulte ankaŭ ni
suferos, ; Sed batalante kun
plej granda ĝojo ; Senhalte ni
laboros kaj esperos.

'14 For estas jam la baroj de l'
komenco, ; L' unua muro estas
trarompita, ; Kaj dolĉa estos
nia rekompenco, ; Kiam la
celo estos alvenita!

,&4. La Espero::

'15 En la mondon venis nova
sento, ; Tra la mondo kuras
forta voko; Per flugiloj de
facila vento ; Nun de loko
flugu ĝi al loko.

'16 Ne al glavo sangon
soifanta ; Ĝi la homan tiras
familion : ; Al la mond' eterne
militanta ; Ĝi promesas
sanktan harmonion.

'17 Sub la sankta signo de l'
espero ; Kolektiĝas pacaj
batalantoj, ; Kaj rapide
kreskas la afero ; Per laboro
de la esperantoj.

'18 Forte staras muroj de
miljaroj ; Inter la popoloj
dividitaj ; Sed dissaltos la
obstinaj baroj, ; Per la sankta
amo disbatitaj.

'19 Sur neŭtrala lingva
fundamento, ; Komprenante
unu la alian, ; La popoloj faros
en konsento ; Unu grandan
rondon familian.

'20 Nia diligenta kolegaro ; En
laboro paca ne laciĝos, ; Ĝis la
bela sonĝo de l' homaro ; Por
eterna ben' efektiviĝos.)

& Se la sorto persekutas:

< Rekante 19 el 37 batoj por strofo, entute 1443 paŝoj dum 16 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,6:37> (

/LaLa LaLa Tido Ti Ti; dodo dodo remi re; TiTi TiTi doTi La So;
fafa fafa mire do;

(#Rekantaĵe: mimi rere mifa mi; doododo TiTi redo Ti; mimi re re
doTi La So; mimi rere mifa mi i)

)×39)+

(&Strofoj:

'1 /Se la sorto persekutas, ;
Homo devas fleksi sin, ; Kiel
ajn li eĉ kondutas, ; Sorto
ĉiam venkas lin.

(×: **Ĉarma bela la reĝin'** ;
**Verda okulo ravas lin ; La
reĝino senkompara ; Ĉarma
bela la reĝin'.**)

'2 Dum Viena la foiro ; En la
lastpasinta jar' ; Promenadis
juna viro ; Meze inter la
bestar'.

'3 Al Vieno li vojaĝis ; El
vilaĝ' en kampa val' ; Kaj nur
bestoj al li plaĉis: ; Bovo,
porko kaj ĉeval'.

'4 kaj en fako porabela ; Io tre
mirigis lin: ; Tie estis vere
bela ; Ĉarma tre abelreĝin'.

'5 Havis verdajn jen okulojn ;
Kaj kruraron flavan ĝin' ; Ĝin
kaj sep laborkunulojn ; Sen
hezit' aĉetis li.

'6 En skatolon la kartonan ;
Devis iri la reĝin', ; Kaj en
poŝon pantalonan ; La junulo
metis ĝin.

'7 Sed la tempo ne hezitis, ;
Estis jam la deka hor'; Tra la
urbo li rapidis ; Al la
stacidomo for.

'8 Vagonar' jam ekveturis; Tra la pord' de l' stacidom' ; Li en la vagonon kuris, ; falis sed pro dika hom'.

'9 Iu diris tuj kun moko: ; "Ŝajne regas lin la vin'!" – ; Li paŝetis al sidloko, ; Volis ne plu movi sin.

'10 Sed sur lia dekstra kruro ; Ŝajne migras iu best'! ; Li ĝin palpis kun teruro ; Per rapida vigla gest'.

'11 Sed apudan la matronon ; Li puŝetis per kubut', ; Kaj ŝi diris tuj admonon: ; "Ĉesu via fikondut'!"

'12 Timigite li silentis, ; Ne plu riskis movi sin. ; Sed sur sia kruro sentis ; bestmigradon li sen fin'.

'13 Ho kruela vi fatalo, ; Stranga estas via vol': ; Dum la menciita falo ; Ja rompiĝis la skatol'.

'14 Kaj el poŝ' de l' pantalono ; Tra trueto rampis for ; La abeloj; sub kalsono ; Ili migris kun fervor'.

'15 Kaj subite laŭte kriis ; Pro dolor' la juna vir', ; Kaj neniu homo sciis, ; Kion fari do pro mir'.

'16 "Kial vi nun tiom bruis?" ; Alparolis lin sinjor'. ; Sed li frotis, forte skuis ; Sian kruron pro dolor'.

'17 Li respondis ekscitite: ; Ili ĉiuj kuris for, ; Ili pikis min subite ; Laŭ kutima sia mor'.

'18 Ve! Ho ve! Ĝi min torturas, ; Ili tiom pikas min! ; Se ne ĉiuj vi forkuras, ; Ili pikos ankaŭ vin!"

'19 Kaj tuj kriis tuta ĥoro: ; "Estas li freneza hom'; Helpu, helpu, konduktoro, ; Kuris li el ŝtata dom'!"

'20 "Gesinjoroj, silentadon! ; Tuj ni haltos ja en Moor, ; Tuj esploros ni la staton; Kiu el vi kuris for?"

'21 Jen la vagonaro haltis ; Ĉe stacia la peron' ; Kaj la pasaĝeroj saltis ; Time for el la vagon'.

'22 Oni ŝlosis tuj la pordon, ; Kaj la ĉef' de l' stacidom' ; Kriis do, por fari ordon, ; Tra l' fenestro al la hom':

'23 "Ĉu sincere do konfesis ; La forkuron vi, sinjor'?" ; La alia vigle jesis: ; "Certe, ĉiuj estas for!"

'24 "Ĉiuj? Kiom do kuniris?" ;
"Sep simpluloj kaŝis sin" ; La
junul' malgaje diris, ; "Kaj kun
ili la reĝin'."

'25 "Ĉu reĝin' kun sep
kunuloj? ; Kiel do aspektis
ŝi?" ; "Verdaj estas la okuloj, ;
Flavajn kruojn havas ĝi."

'26 "Jen reĝino senkompara! ;
Kiu akompanis ŝin?" ;
"Abelaro ordinara", ; La junul'
informis lin.

'27 "Sed ne havu nun subite ;
Vi abelojn en la kap'!" – ;
"Ho" respondis li rapide, ; "Ili
estas ne sub ĉap'."

'28 "Kie do?" – "Sub la
kalsono. ; Ve! Ho, ili pikas
min! ; Iru for de la vagono, ;
Ili pikos ankaŭ vin!" –

'29 Oni sed jam tro atendis, ;
Pasis jam kvarona hor', ; Kaj
la staciestro sendis ; Do la
vagonaron for.

'30 Jen okupis la vagonon ;
Sole nun la kamparan';
Pantalonon kaj kalsonon ; Tuj
deprenis lia man'.

'31 Tra l' fenestro kun kolero ;
Ilin svingis la sinjor', ; Ses
insektoj tra l' aero ; Tuj por
ĉiam flugis for.

'32 Sed jen restis du abeloj ;
Flugu for, malica par'! ; Jen!
Sur la najbaraj reloj ;
Preterkuris vagonar'.

'33 La junulo preskaŭ svenis ;
Kaj skuegis lin terur'; Sed la
vagonaro prenis ; Liajn
krurvestaĵojn nur!

'34 Pro la nova bat' de l' sorto ;
Malesperis la junul', ; Kaj per
sia lasta forto ; Li sin kaŝis en
angul'.

'35 Kaj denove nun ekhaltis ;
En urbet' la vagonar', ; Kaj tra
l' pordo enen saltis ; juna
policista par'.

'36 Kaj ekridis ambaŭ krie, ;
Rigardante al angul': ; "Jen li
vestis sin alie, ; Efektiva
frenezul'!"

'37 Kaj mantelon tuj alportis ;
Ili al la juna hom', ; Kaj tra l'
urbo lin eskortis ; Al la
policeja dom'.

'38 Tie ja post longa peno ;
Fine montris la esplor' ; ke nur
estis miskompreno; Liberiĝis
la sinjor'.

'39 Se la sorto persekutas, ;
Homo devas fleksi sin, ; Kiel
ajn eĉ hom' kondutas, ; Sorto
ĉiam venkas lin.)

& La Vojo kaj Preĝo verdaj:

< Rekante 84 el 145 batoj por strofo, entute 1450 paŝoj dum 17 minutoj. Verkis L. L. Zamenhof (,&1, 1896; ,&2, 1905). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

(<:145>

i;Ti /La domi re remi do TiLa Ti Ti;do Ti Tido Ti LaSi La La;Ti
La domi re remi do TiLa Ti Ti;do Ti Tido Ti LaSi La La

(#Rekantaĵe: a;Ti do SoSo do TiLa Ti dore mi mi;so fa faso mi do
re e;Ti do SoSo do TiLa Ti dore mi mi;so fa faso mi re do)

o;Ti La domi re remi do TiLa Ti do;re mi doTi do Sodo Ti doTi
La La

(#Rekantaĵe: a;Ti do SoSo do TiLa Ti dore mi mi;so fa faso mi do
re e;Ti do SoSo do TiLa Ti dore mi mi;so fa faso mi re do)

o;mi mi domi so mimi mi redo re re;mi so miso so somi re do

(#Rekantaĵe: a;Ti do SoSo do TiLa Ti dore mi mi;so fa faso mi do
re e;Ti do SoSo do TiLa Ti dore mi mi;so fa faso mi re do)

)×(4?5+6))+

(&Strofoj:

,&1. La vojo:

'1 Tra /densa mallumo briletas
la celo ; al kiu kuraĝe ni iras ;
simile al stelo sur nokta ĉielo ;
al ni la direkton ĝi diras

(×: &R: (La vojon antaŭen
en danco espera ; senhalte
paŝadas ni.)×2)

kaj nin ne timigas la noktaj
fantomoj ; nek batoj de l' sorto
nek mokoĵ de l' homoj

(×: &R)

ĉar klara kaj rekta kaj tre
difinita ; ĝi estas, la voj'
elektita.

(×: &R)

'2 Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante ; ni iru la vojon celitan! ; Eĉ guto malgranda, konstante frapante ; traboras la monton granitan L' espe2ro, l' obstino kaj la2 pacienco ; jen estas la signoj, per kies potenco ni, pa2ŝo post paŝo, post lo2nga laboro ; atingos la celon en gloro.

'3 Ni semas kaj semas, neniam laciĝas ; pri l' tempoj estontaj pensante ; cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, - ; ni semas kaj semas konstante "Ho ĉesu" mokante la homoj admonas, - ; "Ne ĉesu, ne ĉesu!" en kor' al ni sonas: "Obstine antaŭen! La nepoj vin benos ; se vi pacience eltenos."

'4 Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj ; velkantajn foliojn deŝiras ; ni dankas la venton, kaj, repurigitaj ; ni forton pli freŝan akiras Ne mortos jam nia bravega anaro ; ĝin jam ne timigas la vento nek staro Obstine ĝi pasas, provita, hardita ; al cel' unu fojon signita!

,&2. Preĝo sub la verda standardo:

'5 Al Vi, ho potenco senkorpa mistero, ; fortego, la mondon reganta, ; al Vi, granda fonto de l'amo kaj vero ; kaj fonto de vivo konstanta, al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas, ; sed ĉiuj egale en koro Vin sentas, al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu reĝas, ; (hodiaŭ)×2 ni preĝas.

'6 Al Vi ni ne venas kun kredo nacia, ; kun dogmoj de blinda fervoro: ; silentas nun ĉiu disput' religia ; kaj regas nun kredo de koro. Kun ĝi, kiu estas ĉe ĉiuj egala, ; kun ĝi, la plej vera, sen trudo batala, ni staras nun, filoj de l'tuta homaro ; (ĉe Via)×2 altaro.

.....

'7 Homaron Vi kreis perfekte kaj bele, ; sed ĝi sin dividis batale; popolo popolon atakas kruele, ; frat' fraton atakas ŝakale. Ho, kiu ajn estas Vi, forto mistera, ; aŭskultu la voĉon de l' preĝo sincera, redonu la pacon al la infanaro ; (de l' granda)×2 homaro!

'8 Ni ĵuris labori, ni ĵuris
batali, ; por reunuigi l'
homaron. ; Subtenu nin Forto,
ne lasu nin fali, ; sed lasu nin
venki la baron; donacu Vi
benon al nia laboro, ; donacu
Vi forton al nia fervoro, ke
ĉiam ni kontraŭ atakoj sovaĝaj
; (nin tenu)×2 kuraĝaj.

'9 La verdan standardon tre
alte ni tenos; ĝi signas la
bonon kaj belon. ; La Forto
mistera de l' mondo nin benos,
; kaj nian atingos ni celon.
Ni inter popoloj la murojn
detruos, ; kaj ili ekkrakos kaj
ili ekbruos kaj falos por
ĉiam, kaj amo kaj vero ;
(ekregos)×2 sur tero.

'10 Kuniĝu la fratoj, plektiĝu
la manoj, ; antaŭen kun pacaj
armiloj! ; Kristanoj, hebreoj
aŭ mahometanoj ; ni ĉiuj de
Di' estas filoj. Ni ĉiam
memoru pri bon' de l' homaro,
; kaj malgraŭ malhelpoj, sen
halto kaj staro al frata la
celo ni iru obstine ;
(antaŭen,)×2 senfine.)

& Viljama balado:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 1450 paŝoj dum 16 minutoj. Verkas kaj komponis Martin Strid.>

(#Melodio:

<1,6:29> (/mimi dore mifa soso; soso miisolmi dodo; lala fami redo remi; fafa remi fafa;

(#Rekantaĵe: mi dore mifa soso mi; somi do fala fami; redo remi fare mi do o)

)×50)+

(&Strofoj - fragmento:

'1 /Pri heroa granda viro ; ĉi balado2 temas ; dum mi kantas verajn dirojn ; mia koro tremas

(×:; **Malvarmas Atlantika Mar'** ; **sed militon venigas ; imperion rega rabem'**.)

'2 Patro lia estis pastro ; sanktajn skribojn instruis ; dum patrino per kampanjo ; leĝa lin influis.

'3 Viljam Sted* malriĉa estis ; brava knabo emfazis ; skribis por la loka gazeto ; tion kio okazis.

'4 Ĵurnalisto tre talenta ; baldaŭ gazeton* redaktis ; en verkado elokventa ; aktualaĵojn traktis.

'5 Li per dektriarulino ; pruvis infanprostituon ; paperstokon venis fino* ; pro publika skuo.

'6 La rakonton ĉiuj legis ; gazeto eĉ en sieĝo ; artikoloj popularegis ; ŝanĝis baldaŭ leĝon.

'7 Viljam en malliberejon ; iris tri monatojn ; ĉar pro pruvo li mem pleje ; estis krimjuĝata*.

'8 Verkis Georg Bernard Ŝavo* ; Pigmalionon tutan ; pro sukcesa kampanjo prava ; Virgulina Tributo.

'9 "Amerikaniĝas mondo" ;
Viljam skribis verkon ; kaj en
ĝi sian respondon ;
"homkultura ĉerko"???.

'10 El bankista familio ;
monde plej riĉa viro ; Natan*
regis per financoj ; imperian
aspiron.

'11 "Sesil Roŭdz! En
Sudafriko ; mineralojn minu, ;
de popoloj ekzotikaj ; vi
liberon finu!

'12 Mi en vi investos ĉar ; vi
ne edziĝi2 volos ; mia intereso
do ; en via vivo solos.

'13 Burojn kaj nigrulajn
tribojn ; en Afrika sudo ; de
Zambezo ĝis Namibo ;
civilizon trudu!"

'14 En mil okcent naŭdek unu
; kvaran de a2prilo ;
renkontiĝis tri granduloj ; por
sekreta konsilo.

'15 Viljam, Reĝinald'* kaj
Sesil* ; novan imagis
mondbildon ; Sesilon finance
apogis ; Natan Rotŝildo.

'16 Skribis Viljam al sia
edzino ; pri la ĵusa renkonto ;
"Venas por mi kaj mia gazeto
; granda nun estonto.

'17 Sesil estas mia viro! ; Liaj
ideo2j ravas ; pri l' gazeto je
mia miro ; pli bonajn ol eĉ mi
havas.

'18 Sesil federaciigi ; la
imperio2n volas ; ampleksigi
kaj firmigi ; tiel ni parolas.

'19 Sesil ŝatas min kaj diris ;
kion al nur mi2 dirus ; preme
donis dudek mil pundojn ; ke
mi ĉion akiru.

'20 Donis li dudek mil
pundojn ; sen repaga2 devo ;
por gazeta monabundo ; –
ŝajnas fea revo!

'21 Laŭ li Palmalan Gazeton ;
Sudafriko tre ŝatas. ; Tuto
kion mi nun diris ; estas tre
privata."

'22 "Ĉiuj parolu angle ; en
mondordo2 nova ; tiel regos
ĉiujn landojn ; la financo
pova."

'23 Anglaparola ideo ; novan
ordo2n donos ; kie centraj
bankoj kaŝe ; regos mondan
monon.

'24 Per tiu regideo ;
bankposedantoj igos ; ke la
riĉojn de ĉiuj homoj ; ili al si
ligos.

'25 Sesil Roŭdz instigis al ;
tutmonda konstru2faro ; volis
Viljam ke ne estu ; lingvo ĝia
baro.

'26 "La burajn respublikojn ;
baldaŭ ni su2bigu ; ili ne estu
sendependaj ; – en imperion
ligu!"

'27 Pro Viljama trojustemo ;
Sesil ne plu2 volis ; pri la
imperia temo ; kun li paroli.
.....

'28 Mortis Sesil eminenta ; en
lando laŭ li no2mita* ; skribis
pri la testamento ; Viljam
senkredita.

'29 Londonan Esperanto-
Klubon ; Viljam brave2
fondis* ; pri la lingvo stultan
dubon ; vigle li respondis.

'30 Britan espan asocion ; en
la sekva2 jaro* ; fondis por la
imperio ; jen viljama faro.

'31 Esperantan
mondkongreson ; li ĉeesti2s
frue* ; sed la lingvon, jen
konfeso ; li ne regis flue.

'32 Iris li al Germanujo* ;
pacon propa2gandi ; parolis en
fervora tujo ; sen gramatikon
frandi.

'33 Senatoro Aldriĉ* trajnon ;
mendis por kuna vojaĝo ;
verkos bankistoj dum semajno
; juran avantaĝon.

'34 Senatoro Aldriĉ trajnon ;
mendis por iri al klubo ; kie ili
dum semajno ; identiĝis nube.
.....

'35 Viroj sep en granda kaŝo ;
venis al Ĝekil-insulo ; kune
teksti leĝan maŝon ; monan por
riĉeguloj.

'36 Frank Vanderlip* kaj Paŭl
Varburg* ; kaj tri viroj de
Morgan* ; Aldriĉ kaj oficisto
Andruz* ; trezorejon zorga.
.....

'37 En sekreta konferenco ; ili
interkonsentis ; kaj ties
konsekvencojn ; usonanoj
pentos."

'38 En sekreta konsilio ; ili
interkonsentis ; kontraŭ usona
konstitucio ; mankos
konkurenco."

'39 Leĝon ili arĥitektis ;
Federalan Rezervon* ;
paragrafojn ruze plektis ; por
ĉi bankojn servi.

'40 En sekretaj konferencoj ;
ili interakordas ; kaj ties
konsekvencoj ; ĉiujn gentojn
mordas.

'41 Sensekuran monideon ;
peras ora manko ; ek de kreo
ĝis perejo ; regos ĝin la banko.
.....

'42 Prezidanto Taft* invitis ;
al Usono Viljamon ;
packongreson por viziti ; kun
parolprogramo.

'43 Venus Morgan per sama
ŝipo ; konis Viljaman
agendon; sed en lasta
momento sian ; vojaĝon li
malmendis.

'44 Ĉu Titanik vere estis ;
Olimpiko kaduka ; (en
riparon)?(interŝanĝen) Morgan
investis ; asekure truka.

'45 Vespermanĝe pri rakontoj
; vikle Viljam informis ; ŝipo
trafis glacimonton ; dum li
bone dormis.

'46 Helpis li en savboatojn ;
virinojn kaj infanojn ; sian
propran savoveŝton ; donis al
kompano.

'47 Ĝuste pri manko savboata
; Viljam delonge avertis* ; en
artikoloj debataj ; mem nun
mankon spertis.

'48 Kun amiko en la frosto ;
per floseto naĝis ; kruroj
malvarmis ĝis osto ; tamen
resti kuraĝis.

'49 Tenis floson kun amiko ;
pli da varmo bezonis ;
glaciiĝis la artikoj ; fine
ambaŭ dronis.....

'50 Post regado eklezia ; dum
kristana miljaro ; venis
subpremo alia ; de sekreta
frataro.)

& Pigra Petro:

< Rekante 21 el 41 batoj por strofo, entute 1476 paŝoj dum 17 minutoj. Rusan popolan fabelon poemigis Julio Baghy (Ĉielarko, 1966). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:41> (/mi so mimi rere dodo; SoSo MiSo dore mi re; mi so somi rere mido; somi rere doTi doLa;

(#Rekantaĵe: mi so mi reTi do La; SoSo MiSo dore mi re; mi so somi re mido; somi re doTi do La a;)

)×36)+

(&Strofoj:

'1 Petro estis grasa knabo ;
kun pomvangoj, dika kapo;
post satigo li senage ; ronke
dormis nokte, tage.

(×:; **Alte saltas la tigro ;
Mortmalsatus ĝi per pigro ;
kaj ne saltus ĝi alte ; Alte
saltas la tigro.**)

'2 Paĉja digno se admonis ;
panja mildo tuj oponis; ŝi ne
ĉesis lin trovarti, ; eĉ de vento
ŝirme gardi.

'3 Tiel kreskis li plenaĝa, ; sed
tre pigra, ne tro saĝa; eĉ al
manĝo li penpove ; trenis sin
nur limakmove.

'4 Li altiĝis laŭ staturo ; kiel
inter domoj – turo; lia fort
ŝajnis bova, ; sed por la labor'
senpova.

'5 Foje monon li bezonis, ; sed
la patro ĝin ne donis; "Kiu
volas grandsinjori, ; devas
peni kaj labori.

'6 Eble scias vi, verŝajne, ;
mono venas laborgajne; ; se
ĝin havi vi ne penis, ; ĝi
foriras kiel venis.

'7 Mi konsilas, rememoru, ;
unu rublon perlaboru ; kaj mi
tiam, ne plifruue, ; donos plio
kontribue!"

'8 Petro pensis – aĥ, kruele! – ;
kaj li kuris tuj ribele ; al la
kara panjo plendi, ; helpon de
ŝi nun pretendi.

'9 Kiel ĉiam, la patrino ;
premis lin al sia sino ; kaj
karezis, kisis multe: ; "Paĉjo
agaz iom stulte".

'10 Lin persvadi ŝi promesis, ;
sed ĉi-foje ne sukcesis, ; ĉar la
patro tre obstine ; tiel ŝin
rifuzis fine:

'11 "Hej, virino kokin-mensa,
; tia amo senpripensa ; kovas
en la knabo pekon! ; Mi ne
donas eĉ kopekon".

'12 Kiel helpi, kion fari, ;
patran spiton nun ripari? ;
Panjakore ŝi cerbumis ; kaj
planeton ekplenumis:

'13 "Ho, fileto, mia kara, ;
paĉjo estas nun avara, ; sed ni
povas saĝon uzi, ; lian volon
superruzi.

'14 Jen mi ŝovas en poŝeton ;
unurublan bankbileton; por ne
fasti dum la tago, ; lardon
havos vi en sako.

'15 Iru kampen nun libere ; kaj
revenu nur vespere, ; al li
donu tiun monon ; kaj postulu
la aldonon!"

'16 Nu, al Petro la aranĝo ;
plaĉis tre, do tuj post manĝo ;
frumatene kampen iris, ; sin
sub ombron li entiris.

'17 Tie dormis li trankvile ;
dum la suno ardis brile; post
kiam ĝi subeniris, ; ankaŭ li
mem hejmeniris.

'18 Tuj la rublon li etendis ; al
la patro kaj atendis ; je aldono
promesita... ; Sed la patro
restis spita.

'19 Li la rublon geste petis, ;
poste ĝin en formon ĵetis, ;
moke diris kun rigoro: ; "Ĝin
vi gajnis sen laboro!"

'20 Kion fari? – Petro pensis, ;
tagan dormon rekomencis, ;
sed la panjo lin senbrue ;
flustre vekis jam tre frue:

'21 "Jen, flieto, en poŝeto ;
unurubla bankbileto; kuko,
koko en pansako, ; ke ne
grumblu la stomako.

'22 Sed nun zorgu dum reveno
; pri postsignoj de ŝvitpeno;
certe ŝajnus tre utile, ; se vi
ŝmirus vin argile..."

'23 Li do agis laŭ konsilo ; kaj
sin ŝmiris per argilo; post
tuttaga nenifaro ; li revenis de
kamparo.

'24 Li la rublon tamen metis, ;
ĝin la patro fajren ĵetis, ; ree
mokis kun rigoro: ; "Ĝin vi
gajnis sen laboro!"

'25 Kion fari?--- Ŝultrotire ;
dormi iris li trankvile, sed lin
dormo nun evitis, ; li pensadis
kaj decidis.

'26 En krepuska horo frua ; ĉe
kok-krio la unua, ; pigra Petro
eĉ tre vigle ; al vilaĝo marŝis
migre.

'27 Inter domoj li zigzagis, ;
laborserĉe haltis, vagis; li
balais straton, korton, ;
sakportante streĉis forton,

'28 fosis, plantis en ĝardeno, ;
ĉaron tiris kun ŝvitpeno, ; dek-
kopeka kapitalon ; gajnis
puriginte stalon.

'29 Cent kopekoj, unu rublo! ;
Cent moneroj nur el kupro! ;
Tamen ŝajnis orvalora ; sumo
post la tag' labora.

'30 Li aspektis laca, vere; sed
li tenis sin fiere: ; "Jen la
rublo! Do kalkulu! ; Pri mi
moke ne skrupulu!"

'31 Sed la patro tamen dubis, ;
la monerojn ĵete ŝutis ; en la
fornon kun rigoro: ; "Ĝin vi
gajnis sen laboro!"

'32 Petro saltis post sekundo ;
neatente pri brulvundo ; preni
el la ardaj cindroj ; cent
kopekojn per la fingroj.

'33 Dum pri tio li klopodis, ;
patra ĝojo jen akseptodis: ;
Tiun rublon, nun mi vidas, ;
por laboro vi meritas.

'34 La aldono ne forestos. ; Eĉ
ni gaje kune festos. ; Vi
fariĝos viro brava, ; devoscia,
honesthava".

'35 Depost tiam – diro migras
– ; pigra Petro ne plu pigras, ;
sed volonte kun fervoro ; ĉiam
pretas por laboro.

'36 Famo pri li eĉ asertas, ;
kion li mem ĝoje spertas, ; ke
post tiu grava ŝanĝo ; por li
gustas pli – la manĝo.)

& La cerbo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 1479 paŝoj, aŭ rekante 12 el 25 batoj por strofo, entute 1275 paŝoj, dum 14 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per novaj (#N) melodio kaj rekantaĵo. Alternativaj (#A) melodio kaj rekantaĵo estas tiuj de La plej granda kulpulo.>

(#Melodioj:

(#A: < 1479 batoj, 14 minutoj.> <:29> La /dore mi mi mire fare mi do; do redo dodo doLa dodo doTi; (#Rekantaĵe: La dore mi mi re falre mi; doTi reTi do Lado Ti Ti La a)

?

(#N: < 1275 batoj, 14 minutoj.> <:25> a;Mi /mimi rere TiTi doTi La Mi;Mi LaLa TiTi dodo TiLa Ti Mi;Mi mimi rere TiTi doTi La Mi;Mi LaLa TiTi dodo doTiLa Ti La)

)×51)+

(&Strofoj:

'1 La /reĝo de la bestoj
malsanegis, ; langvore kuŝis.
Lin la vulpo flegis,

(×:;

(&A: **Venu mastrino en la2
ĉen' ; Prenu mian manon en
firma ten'.)**

?

(&N: **Leono jen malsata
devas manĝi ; La vulpo
favorata povas aranĝi.)**

)

'2 la ruza vulpo, lia favorato. ;
La reĝo diris: "Murdas min
malsato,

'3 ĉar ĉasi, ve, nun mankas al
mi forto. ; Nur vi min povas
savi el ĉi sorto.

'4 En la arbaro vivas cervo
bela; via sagaco, via lang'
miela,

'5 mi estas certa, havos la
rimedon ; havigi al mi tiun
bonan predon."

'6 La vulpo, do, tre ruzan
planon teksis. ; La cervon li
vizitis, genufleksis,

'7 kaj diris: "Grandan novon
mi alportas: ; Malsanas la
leono, preskaŭ mortas,

'8 eĉ pri la posteulo jam
disponis: ; "Ne taŭgas la
pantero — li rezonis —

'9 "ĉar tro impeta, nek la stulta
apro, ; nek, kvankam barba, la
ventkapa kapro,

'10 nek la vantega, sangsoifa
tigro, ; la urson malindigas
granda pigro,

'11 la cervo — jen! Li estos
reĝo bona, ; kun longa vivo,
kun statur' impona,

'12 kun kornoj branĉaj, kiuj la
popolon ; timigos." — Mi ne
tiru la parolon,

'13 vi estas elektita! Reĝ' vi
estos! ; Ho, se en la arbaro vi
regnestros,

'14 ne lasu for la vulpon, la
sindonan, ; kiu alportis ĉi
sciigon bonan.

'15 Mi kuras nun. Adiaŭ, glora
cervo! ; La malsanul' atendas
min por servo.

'16 Mi estas lia konsilant'
intima, ; kia mi estos, jam de
tag' proksima,

'17 al vi, mi kredas, se vi uzi
povas ; ĉi kapon oldan. Ej! Ĉu
vi ne trovas

'18 do oportune fari al li
viziton? ; De l' lastaj vortoj
havas vi profiton."

'19 La cervon trompis la
mensog' belsona, ; kaj li ekiris
al la grot' leona.

'20 Lin la leon' atendis jam
avide, ; sed li atakis iom
trorapide,

'21 en granda hast' maltrafis
sian celon, ; kaj ungis al li sole
la orelon.

'22 La cervo, terurita, kun ĉi
vundo ; eskapis, kuris al
arbara fundo.

'23 "Ej, ej!" La vulpo
malespere gestis. ; La multaj
penoj, jen do, vanaj estis.

'24 Murmuris la leono pro
ĉagreno, ; lia stomak'
murmuris pro malpleno.

'25 Li fine petis la ruzulon
vee, ; ke ian finton li elpensu
ree.

'26 La vulpo streĉis al si la
kranion: ; "Nu, malfacile! sed
mi provos ion."

'27 Li iris do, la planon li plu
kovis, ; post longa voj' la
cervon li retrovis.

'28 Ĉi tiu kriis al li ĉe l'
renkonto: ; "Ĉu vi kuraĝas
veni do sen honto,

'29 farinte al mi la intrigan
krimon? ; Forportu de mi vian
vulp-animon,

'30 kaj faru reĝon el stultul'
alia!" ; La vulp' respondis kun
mieno pia:

'31 "Vi certe havas koron tre
poltronan, ; kaj kalumnias la
amikon bonan!

'33 Kiel mortanta patro bonan
filon, ; li volis vin altiri, kaj
konsilon

'34 bonvolan doni al vi
oreflustre: ; Kiel vi gardu
vian regnon ĝuste.

'35 Sed — honte! — vi brutale
fortiriĝis, ; ke eĉ orelo via
ekŝiriĝis.

'36 Li tre indignas, ke vi lin ne
fidas, ; kaj, kion fari, li jam eĉ
decidas

'37 la lupon fari reĝo, la
friponon! ; Ho ve, vi portis al
ni ĉi malbonon!

'38 Se vi almenaŭ venus, por
riparo ; de via granda peko kaj
eraro!

'39 Mi ĵuras je la arboj, fontoj,
steloj, ; kaj tiel donu al mi la
ĉieloj,

'40 ke mi vin servu, kiel estas
vere, ; ke li vin amas, amas
plej sincere,

'41 ke sen intenc' malbona en
la koro ; li estas al vi plena de
favoro,

'42 reĝigi volas vin, ĉar li vin
ŝatas ..." ; Kaj tiel plu. La
vulpo, klaĉas, flatas,

'43 la cervo, fine, de l'alloga
trompo ; moliĝas, kaj ekiras ..
. al la tombo.

'44 Ĉar en la faŭko de la grot',
subite ... ; Nu, tiutage tre
bonapetite

'45 la reĝo manĝis,
karnopecojn glute, ; la ostojn
maĉe, manĝis preskaŭ tute

'46 la internaĵojn, dum la
vulpo staris, ; rigardis kaj
salivo-verŝe flaris.

'47 Ho! Jen la cerb'! Li ŝtele
ĝin konsumis, ; kaj sin
tiamaniere premiumis.

'48 Sed la leono, kun ekscita
nervo, ; ekserĉas nun la
cerbon de la cervo.

'49 "Kie ĝi estas, kie?" Sen
konfuzo ; respondas lin la
majstro de la ruzo,

'50 ridante kun grimaco
mokrikana: ; "Ho reĝo, via
serĉo estas vana:

'51 "Ties kranio carbon ne
entenas, ; kiu dufoje en ĉi
groton venas.")

& Jun kaj Lager:

< Rekante 30 el 54 batoj por strofo, entute 1566 paŝoj dum 12 minutoj. Norda Kantaro #4436. Post Kukoletto (1993) el sveda tradukis Martin Strid (2014). Klarigoj (*): '1 D'ris = diris. '3 'Stas = estas. '6 Kaj virino kaj viro, do ĉiuj homoj.>

(#Melodio:

<2,2:3> (

MiMi /La La Ti /do Ti La /mi mi ma /mi i; do /do Ti do /mi i ; mi /mi mi mi /so mi mi /re Ti Ti /Ti i; dore /mi Mi Mi /Mi i; Mi /La La Ti /do Ti La /mi mi ma /mi i; dolre /dodo Ti Si /La a;

)×29)+

(&Strofoj:

'1 Sin/jor' Lager /servis en /reĝa bi/en' ; Vi /estu laŭ /bon' ; dum /dek kvin se/majnoj kaj /tutjara /pen'. ; "Servu /fide", d'ris /Jun. ; Mi /zorgas, ĝi /kostos da /plej ruĝa /or' ; "Mi2 /sekvas", d'ris* /Jun.

'2 Tie /servis li /ne tiom /por mona /cel'

(×:; vi /estu laŭ /bon' ;)

ĉar /reĝa fi/lino por /li estis /bel'. ; "Vi trom/piĝos",

(×:; d'ris /Jun. Mi /zorgas, ĝi /kostos da /plej ruĝa /or' ; "Mi2 /sekvas", d'ris /Jun.)

'3 Kiam /vidis la /lastjaran /tagon jam /ili /Lager fa/riĝus de l' /reĝo bo/filo. ; 'Stas* mal/juste",

'4 Nove/dzinon kon/dukis i/li al pre/ĝej'. Ŝin /miris kaj /grandaj kaj /malgrandaj /plej. ; "Ŝin ĉu vi /ŝatas?"

'5 Nove/dzino en/iras en /preĝeja /hal' kun /orkrono /ruĝa kaj /vango en /pal'. ; "Restu /sana!"

'6 Nove/dzino pre/ĝejen an/taŭas per /ir'. Ŝian /belon /laŭdis kaj vi/rino kaj /vir'* ; "Ŝi 'stos /mia",

'7 Nove/dzino en /belo sta/ras
ĉe al/tar' en /ruĝaj
or/vestoj kaj mal/fiksa ha/rar'.
; "Al mi vi /karas",

'8 Ili /trinkis dum /tagoj, ili
/trinkis dum /du sed ne
/volis nove/dzino al /lita si/tu'.
; "Plu2 /sidu!"

'9 Ili /trinkis dum /tagoj, ili
/trinkis dum /tri. Ne /volis
nove/dzino jam /vidi al /lit'. ;
"E21/tenu!"

'10 La /kvaran /tagon jam /iĝis
ves/per'. Al /lito ri/gardis
nove/dzin' kun e/sper'. ; "Ĉu vi
dor/memas?"

'11 Nove/dzino el /nuptfesta
/dom' haste /iris.
Servi/stinoj de /ŝi ŝtrumpojn,
/ŝuojn for/tiris. ; "Vi te/diĝas",
.....

'12 Nove/dzino ek/kuŝis en
/lito kon/klude. Sin/jor'
Jun ku/ŝiĝis sin /bele a/pude. ;
"Bonves/peron!"

'13 Sed La/geron en/venis
me/saĝo ra/pida. "Nun
/dormas sinjor' /Jun ĉe
nov/edzino /via." ; "Ili
/klaĉos",

'14 Sin/joron La/geron fe/roco
ek/muĝis. /Tiel li /vange
kaj /palis kaj /ruĝis. ; "Ĉu vin
do/loras?"

'15 Trans /larĝtablon /kuris
sin/joro La/ger' ke
/planken ĵe/tiĝis vin', /manĝo
kaj bi/er'. ; Iru /bele,

'16 Ko/lera La/ger' prenas
/glavon per /fort' kaj /ĵuris
per ĝi /haki tuj /Junon al
/mort'. "Ĝi 'stas /rusta",

'17 Sinjor' /Jun ĵetis /dure
La/geron kontraŭ /mur'
fiksas?belis?oris /muŝojn kaj
/kulojn en /barba kon/tur'.
"Estis /juste",

'18 Lager /frapis la /pordon
per /fingretoj /kvin
"Ek/staru, mal/ŝlosu, mia /kara
nove/dzin'!" "Ŝi2 /dormas",
.....

'19 "Se mi /staru ek/stere jen
/ĝis taga /lum' ni /du iru
/morgaŭ al /reĝa la /dom",
"Ni2 /faru!"

'20 /Kiam ta/giĝis kun /ĉiela
/lum' ti/am iris /ambaŭ al
/reĝa la /dom',
"Bonma/tenon!",

'21 "Mia /plej graca /reĝo, plej
hu/mila jen /pet',
per/meson por /plendi ĉe /vi,
jen sub/met'." "Diru /veron!",
.....

'22 "Pli ol /mortsagoj /sep al
mi /lezas ran/kor' ke ĉe
/mia e/dzin' dormis /Juno
sin/jor'." "Jes mi /faris",

'23 "Ĉar /ambaŭ vi /tenas ŝin /kara en /prav' do /vi du ba/talu per /akro de /glav'." "Mi2 /gajnos",

'24 Tag/meze ba/talen ili /lokon jam /iru ho/diaŭ ja /staru o/ni kiel /viro. "De vi /batu!",

'25 U/nuan la /baton, kiun /batis la /du Jun /batis La/geron, ke li /falas ge/nuen. "Vi post/restos",

'26 /Duan la /baton ili /batis laŭ /rang' Jun /batis La/geron, ke /fluis la /sang'. "Vin se/kigu",

'27 /Trian la /baton, ko/lera ĝis /fund' /Lager' batis /Junon, mor/tiga la /vund'. "Kura/ciĝos",

'28 /Kvaran la /baton por /mortodan/ĝer' Jun /batis La/geron, li /falas al /ter'. "Nu2r /kuŝu!"

'29 Nove/dzin de La/ger' diris /tiel kun /ĝoj' ; Vi /estu laŭ /bon' ; "Mi /ĝojas ke /gajnis sinjor' /Jun en ĉi /foj'." "Nun vi /mias, d'ris /Jun. Mi /zorgas, ĝi /kostos da /plej ruĝa /or' ; "Mi2 /sekvos", d'ris /Jun.)